

ESPERANTO INTERNACIA

Monata organo de la Internacia Esperanto - Ligo

Vol. 2, N-ro 5

Majo 1938

Eldonanto : Internacia Esperanto-Ligo,
Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

Adreso de la Redakcio : Teo JUNG
Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.

Jarlibro 1938

Tion oni devas konfesi: en Heronsgate la laboroj estas farataj akurate. La jarlibro estas promesita por la fino de marto, kaj ĝi eliras en la fino de marto.

La nunjara jarlibro de Internacia Esperanto-Ligo ne montras, kiel la pasintjara, oran kovrilon — la Ora Jubileo de Esperanto jam estas pasintaĵo; la nuna prezentas sin en blua kovrilo. Blu estas la koloro de l' ĝojo. Sed la bluo ankoraŭ havas multajn grizajn makuletojn: ankoraŭ ni ne senmanke rajtas ĝoĝi. Tamen oni povas en tiu ĉi momento diri ke la krizo de la neŭtrala Esperantomovado, kaj entute la krizo de la Esperantomovado, estas nun venkita. La neŭtrala esperantistaro plu havas sian unuecan organizon, kiu dum mallumaj momentoj de la jaro 1936 minacis disfali. IEL atingis en la pasinta jaro jam 13500 membrojn; ankoraŭ ne tiom kiom UEA posedis en 1935 (16200), — sed, kiel diras la prezidanto de IEL, s-ro Bastien, en sia antaŭparolo al la jarlibro, « ĝia vivo, ĝia progresado estas certaj ». La kaŭzoj de tiu sukceso estas « fido kaj laboro »

Post la fino de sia unua jaro IEL konsistis, laŭ la jarlibro, el 18 landaj asocioj, 1 faka asocio, 13487 membroj, 19 ĉefdelegitoj, 13 perantoj, 925 delegitoj, 150 vicdelegitoj, 144 fakdelegitoj. (Intertempe ankoraŭ la Svisa Esperanto-Societo decidis aliĝi al IEL.) Dum 1937 (Fino sur paĝo 66.)

Konforme al nia projekto sciigita sur la unua paĝo de la marta numero de E.I. ni turnis nin plue al la ŝatata filino de la majstro, f-ino Lidja Zamenhof, kiu pro sia nuntempa vojaĝado en Usono ankoraŭ ne povis respondi, kaj al la Prezidanto de la Esperantista Akademio, s-ro Ir. J.R.G. Isbrücker. S-ro Isbrücker bonvolis liveri al ni tre interesan artikolon pri « Lingvaj problemoj », kiun tamen, pro abunda materialo por la maja numero de E.I., ni devas prokrasti. Niaj legantoj do trovos ĝin en la venonta numero.

Ankoraŭ sukcesoj en Londono F-ino Saxl havas 250 kursanojn en la kongresurbo

Kiam antaŭ kelkaj semajnoj la direktoraro de la Londona Grandmagazeno Selfridge anoncis al siaj geoficistoj, ke okazos Esperantokurso en la magazeno, tuj preskaŭ tricent personoj proponis sin kiel partoprenontojn !

Tiu alta cifero iom konsternis la magazinestrojn, kaj fine ili decidis elekti tridekon el la anoncintoj por partopreno en du kursoj. Por pli granda nombro ili ne povis disponi la necesan tempon dum deĵoraj horoj.

Nun venis feliĉa solvo al la problemo, kaj ĵus ko-




Unu el la vastaj cambroj en la « Corner House ». En la supra ĉambro okazos komuna lunĉo por mil kongresanoj tuj post la oficiala inaŭguro.

menciĝis nova kurso por OKDEK personoj ekster deĵoraj horoj. Nun, do, lernas nian lingvon entute 110 geoficistoj de Selfridge !

Certe la kongresanoj vizitos amase tiun ĉi vastan entreprenon, kiu ja estas unu el la plej interesaj vidaĵoj de Londono — kaj tiel ili montras al la magazinestroj ke ne vane tiuj instigis siajn geoficistojn lerni Esperanton por ke ili servu al la alilandaj vizitantoj en aŭgusto.

Entute la ĉiam senlaca f-ino Saxl nun instruas nian lingvon al 250 personoj en Londono en sep Cseh-metodaj kursoj — senescepte kun brilaj rezultoj. La apudaj bildoj montras la eksterajn kaj internajn de la granda restoracio Lyons' Oxford Corner House, kie okazas kurso por 24 gekelneroj kaj aliaj oficistoj.



La impona eksterajo de la « Lyons Oxford Corner House », ĉe la angulo de Oxford Street kaj Tottenham Court Road en la centro de Londono.

E. W. A.

La Unua Eŭkaristia Esperanto-Mondkunveno

Proksimiĝas la plej signifplena okazantaĵo de la katolika Esperanto-movado.

La unua paŝo por efektiviĝi la enkondukon de Esperanto en la Eŭkaristian Kongreson estis la artikolo: *Esperanton en la Eŭkaristiajn Kongresojn*, aperinta ĉirkaŭ antaŭ jaro kaj verkita de la ĉefsekretario de la Hungarlanda Katolika Esperanto-Societo. La pluaĵ paŝoj kaj penadoj estas priskribitaj en la « Dokumentaro », verkita de D-ro Prof. F. Erdey kaj aperinta en « Katolika Stelo ».

La semoj falis al tero seka kaj indiferenta. Nur por kelkaj sukcesis enradikiĝi. Tro malmultaj estis la fervoruloj, kiuj rapidis helpi al la fanatikuloj, elektintaj celon grandiozan. Sed kun la fervoruloj malmultnombraj kunhelpis Dio! Kaj denove praviĝis: Se Dio helpas, kiu kontraŭas?

Nun ni staras antaŭ la rikolto kaj dankeme ni povas diri: Dio benis nian penadon.

Sekve de la faritaj klopodoj, la interesiĝo de la tutmonda katolikaro esperantista estas direktata al nia mondkunveno, — kaj la interesiĝo de la ruthungara katolikaro al la lingvo Esperanto, destinata ebligi la interrilatiĝon de la diversnacia kredularo.

Centoj kaj centoj lernas Esperanton, ne nur en Budapeŝto, ne nur en la tuta Hungarujo, sed laŭ la alvenintaj sciigoj, en ĉiu parto de la tero, por ebligi la interfratiĝon dum la Kongreso.

En Hungarujo unuavice estas menci-

indaj la oficialaj kursoj, aranĝitaj por la fervojistoj, por la poŝtistoj kaj por la tramistoj. La nombro de la kursanoj estas preskaŭ 500. La nombro de la partoprenantoj de neoficialaj kursoj kajleterkurso atingas la milon.

Laŭ la alvenintaj sciigoj el eksterlando, tre multaj lernas Esperanton inter la partoprenantoj de la kongreso, precipe en landoj, kies lingvo ne estas ĝenerale konata.

La uzadon de nia lingvo ni povis certigi dum la Kongreso en ne tute kontentiga grado.

Estas permesata la uzado de nia Esperanto la 26-an de majo dum la unua publika kunsido, kiam la nacioj salutas la kongreson. Dum aliaj kunsidoj okazas nur hungarlingvaj paroladoj tradukataj en italan, germanan kaj francan lingvojn, sed ne en Esperanton.

Estus konsilinde, se la partoprenantoj de ĉiuj aliaj nacioj petus en *nacilingvaj leteroj* la preparan Komitaton (Adreso: Kongresszus Előkészítő Bizottság, Budapest, Ferenciek tere) ke la tradukoj okazu ankaŭ en aliajn naciajn lingvojn, aŭ en Esperanton. Same konsilinde estus peti ankaŭ la radiostacion (adreso: Magyar Rádío r. t. Budapest, Sándor u.) ke la disaŭdigoj okazu ankaŭ esperantlingve.

Krom la menciitaj salutparoladoj, ni povas uzi nian lingvon dum la Unua

la delegitoj, vic- kaj fakdelegitoj faris al la membroj 1183 servojn, nome: 158 komercajn, 544 turismajn, 135 fakajn kaj 346 ĝeneralajn. La Centra Oficejo ricevis dum tiu sama jaro 7063 kaj dissendis 15515 poŝtaĵojn, krom la gazetoj.

La bilanco montras por 1937 ankoraŭ deficiton de ĉ. 12000 sv. frankoj, ĉe tutspezo de ĉ. 44000 fk. Interese estas ke en tiu spezo la 10790 MA (asociaj membroj) partoprenas per ne pli ol 5341.88 fk. Do, por tiu relative malgranda sumo oni prezentas la eblon, eĉ la ne-kapitalfortajn gesamideanojn aligi al la internacia movado. Aliflanke tiu fakto montras ke nura federacio de landaj asocioj (kun nur sociaj membroj, sen la individuaj) apenaŭ estus vivkapabla. Jam el tiu kaŭzo, krom el diversaj aliaj, estas sensencaj la sugestoj kaj klopodoj, disbati la nunan IEL-unuecon por anstataŭigi ĝin per nova dueco (dualismo) kvankam interkonsenta. La Esperanto-movado tenu kion ĝi atingis ankaŭ en organiza rilato. Ĝi ne devas malprogresi al antaŭa stato sed prefere progresi al

ankoraŭ pli firma unueco, al ankoraŭ pli granda perfekteco. Nova interkonsento povus esti starigata eventuale nur sur proksimume tia bazo, kian proponis IEL en Varsovio (la traktadoj pri tio troviĝas ankaŭ en la jarlibro).

Cetere la jarlibro enhavas multajn aliajn interesajn faktojn — kio estas ĉefa — la adresaron de la delegitoj, grupoj ktp.

La libro ampleksas 350 paĝojn, do preskaŭ 100 paĝojn pli ol la pasintjara « ora » jarlibro. Certe oni ankoraŭ ne atingis la imponan amplekson de 500 paĝoj, kiun montras la UEA-jarlibro de 1927; sed, por enmeti la libron en la poŝton, eĉ la nuna amplekso preskaŭ jam estas troa.

Ĉiukaze IEL atingis en la mallonga tempo de sia ekzistado jam atentindajn rezultojn. Ni ne dubas ke ĝia progreso daŭros, sammezure kiel la gesamideanaro pli kaj pli komprenos la vercon de ĝia devizo ke « Unueco estas Forto »!

T. J

Eŭkaristia Esperanto-Mondkunveno, kiu estas okazonta en la kadro de la Eŭkaristia Kongreso.

La Mondkunveno havos du Eŭkaristiajn Kunsidojn kaj unu Esperanto-vesperon.

Laŭ la ĝis nun alvenintaj konsentoj la kongresparoladoj estos la jenaj: Eŭkaristio kaj la familio, Prof. M. Carolfi (itala); Eŭkaristio kaj la unuiĝo de l' orientaj eklezioj, Prof. M. Kozma (hungara); Esperanto kaj la katolika agado, H.J.M. Eras (nederlanda); Devo de la esperantistoj en la servado de l' eŭkaristia vivo, H. Steiner, Wien (aŭstra); Katolika Mondkompreno, Prof. Felföldi János (hungara), Esperanto kaj la apostoleco, Prof. M. Carolfi (itala)

Ne alvenis la respondoj de L. Chiba (aŭstra): Vinculum caritatis, ligilo de amo; Eŭkaristio kaj mondpaco (?..) ĉeĥa; J. Böhm, Esperanto kaj la misioj (Nord-Borneo); F. Walters (angla), Esperanto kaj la nuntempa situacio de la Eklezio. La malfermparoladojn diros: Patro Zsiros, Prof. Mihalik. La fermajn paroladojn: Prof. Marczell, kanoniko Gy. Lajos.

La malferman sanktan meson celebras: kardinalo Innitzer, la solenan ferman sanktan meson: ĉefepiskopo grafo Zichy.

Sanktaj predikoj: E. Sebestyén (hungara), Esperanto kaj pedagogio; L. Németh (hungara), Esperanto kaj la landa misio; Schmalbaug S. O. Cist., Ĉieleniro de Nia Sinjoro Jezuo Kristo; Kan. Gy. Lajos, La sankta Komunio, nia ĉiutaga pano; Patro Zsiros S.J., Eŭkaristio kaj la sankta Koro de Jezuo.

Esperanto-vespero: teatraĵo de Maria Blasko, Pianludo, deklamoj, kantoj.

En la urbo Esperanto-gvidado; alvenontoj postulu ĉe la kongresejo esperantajn gvidantojn.

K.I.K

La kontraŭuloj asertas

ke la verkistoj kaj poetoj kun abomeno sin forturnas de Esperanto. Fakte, ekzistas verkistoj kiuj malamas nian aferon, sed ĝenerale nur, ĉar ili ne konas ĝin. Kiel tiu germana verkisto (cetere ne tre fama) kiu, laŭ propra konfeso, unufoje aŭskultis Esperantolecionon per radio, poste trinkis brandon, — kaj kiu post tio arogis publike moki pri nia afero. Sed nia literaturo de verkoj tradukitaj el multaj lingvoj pruvas ke ĝenerale la malo estas vera. Eĉ mondfamaj verkistoj volonte permesas ke iliaj verkoj estu tradukataj kaj eldonataj en tiu « abomeninda surrogatlingvo », kaj multaj esprimas sian simpatian al Esperanto per tio ke ili donas al ĝi honoran mencion en iu verko sia.

La Svisa Esperanto-Tago en Biel Svisa Esperanto-Societo aliĝas al IEL 31-a Universala Esperanto-Kongreso 1939 en Bern

Sabaton, la 2-an de aprilo estis, kiel kutime, antaŭviditaj ekzamenoj, sed anoncis sin tro malmultaj kandidatoj kaj ekzamenoj pro tio ne okazis. Por la gesamideanoj kaj interesuloj la Biela Grupo okazigis en la salono de la hotelo Seeland publikan paroladon pri Esperanto, en germana lingvo, Esperanto-ekspozicion el libroj, prospektoj, gazetoj kaj diversaj grandaj kongresfotoj de D-ro Spielmann, Bern, kiu ankaŭ sendigis 60 belajn fotobildojn el Londono kaj faris lumbildparoladon. Pro la bela vetero ĉeestis nur 35 personoj, sed ili estis kontentaj kaj danke aplaudis, eĉ okcidentalisto asertis, ke li estis erarigita.

Dimanĉon, la 3-an de aprilo, Jarkunveno de la Svisa Esperanto-Societo en la sama salono, de 9.30 ĝis 12.30, poste kuna tagmanĝo. Ĉeestis 72 gesamideanoj, el ili 23 grupaj delegitoj.

Post la legado kaj akcepto de la protokolo de la lastjara jarkunveno en Aarau, jarraporto de la prezidanto kaj kasraporto; la jarkotizo restis fiksita je fk. 1.— plus 50 centimoj kiel internacia kotizo, kaj la organo de SES, la « Svisa Espero » estas voĉdonita deviga por ĉiu aktiva membro je fk. 1.—.

Kiel 6-an punkton oni pritraktis la

aliĝon de SES al IEL, jam antaŭe, per voĉdonigo de la grupoj, per malgranda plimulto certigita. SES do aliĝos al IEL, kaj la 31-a Universala Kongreso estas por 1939 invitota al Bern.

Oni elektis kiel novan prezidanton de SES s-ron Prof. Wm. Perrenoud kun Neuchâtel kiel ĉefgrupon. Kiel urbo de la venontjara jarkunveno de SES estas elektita Zürich pro la tiea Nacia Ekspozicio. La Svisa Esperanta Antologio estos baldaŭ prespreta; el la multaj kvarlingvaj aŭtoraj verkoj la plej grandan parton tradukis s-ro J. Schmid, Bern, membro de la Esperanto-Akademio. Ankaŭ pri la eblecoj de Esperanto en la lernejoj, en la trafiko kaj komerco oni parolis, sed ĉio estas lasita nun al la nova C.K. de SES kaj al la grupoj.

La aliĝo de SES al IEL nun estas decidita per 3/5 kontraŭ 2/5, kaj ni tre esperas havi la Universalan Kongreson de Esperanto 1939 en Bern kaj per ĝi refortigon de nia svisa movado kaj konvinkigon de niaj aŭtoritatuloj kaj skeptikuloj por Esperanto kontraŭ la ĉiam ĉe ni ankoraŭ forte kaj troige propagandantaj ldo kaj precipe Occidental. La tutmonda gesamideanaro do ne forgesu nin en 1939. Ĝis ĝojiga revido dum la U.K. en Londono, via D-ro E. S.

Dua Esperanto-kurso sur itala ocean-giganto "Conte Grande"

Unua surŝipa kurso de Prof. Stellacci finiĝis. — Brazilaj esperantistoj faris viziton al « Conte Grande ».

La 8-an de marto finiĝis la unua Esperanto-kurso sur la itala oceanŝipego « Conte Grande ». Antaŭ la fermo de la lecionaro la gvidanto pastro Stellacci gratulis la lernantojn, pro la vere mirindaj progresoj faritaj, kaj instigis la novbakitajn samideanojn daŭrigi la studadon kaj trafe propagandi nian lingvon.

Surprizante ĉiujn, respondis esperantlingve la samideanoj s-ro Pazzaglia, maŝin-oficiro, kaj s-ro Conelli, elektroteknika oficiro, en la nomo de la oficiraro dankante al Prof. Stellacci pro la nova ilo donita al ili, — ilo kiu malfermas, per interkomprenigo, la tutan mondon kiun ili trapasas.

Tiamaniere do nia lingvo estas ankaŭ enkondukita unuafoje en italan ŝipon. — unua paŝo, por ke aliaj sekvu tiun mirindan ekzemplon kaj forigu la maldolĉan solecon el la koroj de mondvojaĝantaj maristoj.

**

La 19-an de marto brazilaj gesamideanoj kun sia prezidanto D-ro Couto Fernandes vizitis la ŝipon, kiam ĝi haltis en Rio de Janeiro. La maristoj-samideanoj akompanis ilin dum la akurata duhora vizito, kiu estis vere frata interkomprenigo kaj vekis inter ĉiuj, ankaŭ neesperantistoj, gravan intereson.

**

La 22-an de marto komenciĝis dua elementa kurso, same gvidata kiel la unua, laŭ Cseh-metodo, de pastro Stellacci.

La plej nova germana sendstacio uzas Esperanton

La sudetgermana sendstacio Prag II enkondukis laŭ propono de samideano Gahler por siaj provsendoj *esperantlinguan anoncadon*!

La gravecon de tiu fakto, ke mez-eŭropa germana stacio uzas nian lingvon, neniu subtaksu kaj kunhelpu sukcesigi la provon. La stacio fiksita la verdlingvan anoncadon sur disko, kaj oni uzos ĝin pli ofte dum la sekvonta tempo. Certan tempon la stacio ne fiksita. Sed bonvolu kelkfoje aŭskulti vespere la stacion kaj respondi; aŭdinte la alvokon pri raportado de aŭskultebleco kaj distanco de la aŭskultloko. La stacio sendas sur ondo 269.5 m, la pli frua ondo de Moravska Ostrava.

B. G.

Inter 31 lingvoj Esperanto sur la kvina loko en enketo de la plej granda jugoslava tagjurnalo 'Politika'

Unu jaron estis gvidataj skribaj kursoj de la lingvoj: franca, angla kaj germana en la plej granda jugoslava tagjurnalo « Politika ». Nun finiĝis tiuj ĉi kursoj, kaj la redakcio malfermis enketon inter siaj legantoj por tri aliaj lingvoj. Ĉiu leganto povis voĉdoni por tri lingvoj. Rezultato de tiu voĉdonado estis laŭ la sciigoj de la redakcio jena: Ricevis voĉojn lingvoj:

1. Itala	7.035	16. Nederlanda	73
2. Rusa	6.461	17. Albana	47
3. Ĉeĥa	4.263	18. Araba	41
4. Hispana	2.918	19. Portugala	39
5. Esperanto	1.200	20. Hebrea	35
6. Bulgara	1.170	21. Dana	33
7. Hungara	1.024	22. Vaska	19
8. Pola	504	23. Finna	17
9. Greka	497	24. Litva (?)	13
10. Turka	432	25. Hinda	9
11. Rumana	430	26. Norvega	8
12. Japana	173	27. Persa	5
13. Sveda	121	28. Afgana	3
14. Slovena	114	29. Lujice-serba	2
15. Ĉina	81	30. Latina	?
		31. Sanskrita	?

Krom tio por stenografio estis 500 voĉoj.

Ni devas akcenti, ke la redakcio de « Politika » ne tro simpatias Esperanton. Tio montriĝis jam pli frue sed ankaŭ nun, kiam la redakcio kelkfoje akcentis, ke nur « vivantaj » lingvoj estas konsiderotaj kaj kiam malgraŭ tio multaj voĉdonis por Esperanto, ĝi ne volis doni ĝustan nombron de voĉdonintoj por Esperanto, sed nur diris, ke « pli ol mil personoj voĉdonis por la internacia lingvo Esperanto ». Pli ol mil povas esti ankaŭ 1.500 kaj 1.900, sed ni prenis minimuman ciferon de 1.200, por ke neniu povu diri, ke ni trograndigas la aferon. Do, la fakto ke « pli ol mil personoj voĉdonis por la internacia lingvo Esperanto », malgraŭ tio, ke la redakcio akcentis, ke estos gvidataj kursoj nur « de vivantaj lingvoj », estas sukceso por nia afero. Ĉar de proksimume naŭ mil voĉdonintoj « pli ol mil » esprimis deziron, ke la redakcio gvidu kurson de « artefarita » lingvo Esperanto! En procentoj tio estas 13 %, sed povas esti ankaŭ 20 %!

Internacia Esperanto - Ligo

Centra Oficejo: Heronsgate, Rickmansworth, (Herts.), Anglujo.

Oficiala Informilo

N-ro 73. 30an de Marto, 1938.

NOVAJ DELEGITOJ.

Bonvolu noti ke la sekvanta informo venis tro malfrue por enpresado en la aperonta jarlibro:

Ĉeĥoslovakujo.

Veseli nad Moravou. — D: J. Kárnik, Prednosta stanice v.v., Veseli nad Moravou cis 903.

Danujo.

Hirtshals (Nordjutlando). — FD. (Komerco): K. Vilsen, Nørregade.

Finnlando.

Mariehamn (Aland). — D: R. Malmberg. FD: (Komerco, Turismo): La D.

Franco.

Rethel. — D: R. Damase, 14, rue Chanzy.

Hungarujo.

Heves. — D: D-ro G. Faykiss, M. kir. adöhi-vatal.

Pécs. — VD: D-ro I. Balla, Munkácsy-str. 34. FD. (Juro): La VD.

Jugoslavujo.

Osijek. — FD. (Dentistaj aferoj): J. Smerdel, Rokova ul. 10. FD. (Maŝintekniko): K. Klein, Reiznerova ul. 115.

FD. (Fotografado): M. Sekulic-Bence, Retfala n-ro 38.

Stari Vrbas. — D: St. Gacic, Karadjordjeva 17.

Vrhnika. — D: V. Jereb, Trzaska cesta 16.

Usono.

Cambridge (Massachusetts). — D: T. Goldman, Winthrop G-32.

MEMBRO-SUBTENANTOJ.

114. A. S. Mellichamp, Peoria, Usono.

115. H. G. Schatz, Brooklyn, Usono.

116. F. de Maria, Iberlucea, Argentino.

UNIVERSALA KONGRESO, LONDONO 1938.

Ĝis hodiaŭ: 1122 aliĝoj el 26 landoj.

C. C. GOLDSMITH,
Ĝenerala Sekretario.

Oficiala Informilo

N-ro 74. 7an de Aprilo, 1938.

NOVA ĈEFDELEGITO

Aŭstralio.

R. R. Rawson, 169, Exhibition Street, Melbourne, C. I.

NOVA DELEGITO.

Latvujo.

Alsvanga. — D: A. Zilbajars, verkisto.

ŜANĜOJ.

Argentino.

Berisso. — Pro translokiĝo provizore ne estas D.

Iberlucea. — Pro translokiĝo provizore ne estas D.

PATRONOJ.

6. F-ino I. C. Fortey, Croydon, Anglujo.

MEMBRO-SUBTENANTOJ.

117. R. Groverman, Gentbrugge, Belgujo.

118. F-ino I.C. Forrey, Croydon, Anglujo.

—o—

MONATA STATISTIKO.

MEMBRARO.

Jen la stato de la pagitaj kotizoj ĝis la fino de Marto, 1938, kaj ankaŭ (por komparo) ĝis la fino de Marto, 1937.

	Marto 1938.	Marto 1937
AM.	2874	3333
MJ.	794	580
MA.	766	687
MAH.	257	212
MS.	118	131
PAT.	5	11
DM.	72	73
HM.	29	31

Sumo 4915 5058

KORESPONDAĴOJ.

Centra Oficejo (sen la gazetoj) dum Marto, 1938:

Ricevitaj	858
Senditaj	2397

3255

—o—

UNIVERSALA KONGRESO, LONDONO 1938.

Aliĝoj ĝis hodiaŭ: 1235 el 26 landoj.

C. C. GOLDSMITH,
Ĝenerala Sekretario.

—o—

INTERNACIA KONKURSO 1938.

Stato je la 31-a de Marto 1938.

	1937	1938	%
1. Jugoslavujo	257	545	212.0
2. Bulgarujo	92	181	196.7
3. Svislando	137	243	177.3
4. Polujo	318	534	167.9
5. Finnlando	61	102	167.2
6. Latvujo	55	91	165.5
7. Litovujo	135	154	114.1
8. Belgujo	1722	1337	77.6
9. Britujo	6483	4903	75.5
10. Portugalujo	317	233	73.5
11. Aŭstralio	429	297	69.2
12. Kanado	74	49	66.2
13. Hungarujo	619	409	66.1
14. Sud-Ameriko	851	499	58.6
15. Usono	1513	875	57.8
16. Nederlando	2837	1635	57.6
17. Danujo	1118	633	56.6
18. Afriko	137	74	54.0
19. Rumanujo	50	27	54.0
20. Ĉeĥoslovakujo	2449	1266	51.8
21. Francujo	5907	2974	50.3
22. Italujo	636	309	48.6
23. Svedujo	3024	1401	46.3
24. Aŭstrujo	789	306	38.8
25. Norvegujo	792	236	30.0
26. Azio	1321	360	27.3
27. Nov-Zelando	265	35	13.2
28. Grekujo	137	—	—

32525 19708 60.4
Meza%

Oficiala Informilo

N-ro 75. 20an de Aprilo, 1938.

NOVAJ DELEGITOJ.

Ĉinujo.

Tientsin. — VD: C. Y. Chow, Kincheng Banking Corporation.

Meksiko.

Mexico. — VD: (nomo erare skribita en jarlibro). G. Castro Guadarrama, Netzahuacóyotl 129 - 6, Mexico.

Nov-Zelando.

Auckland. — D: W.K. Thompson, maŝinisto, c/o Ponsonby Post Office.

Ruatoria (Auckland). — D: A.L. Ferguson, Ruatoria via Gisborne.

Wellington. — FD (Arto): R.D. Saunders 374, Tinakori Road.

Svislando.

Bern. — VD: M. Ardüser, Effingerstrasse 67.

PATRONOJ.

7. D-ro R.H. Crowley, Tewin, Anglujo.

JARLIBRO.

Britujo.

Edinburgh. — Entrepreno: W. J. Stoddart; bonvolu noti novan adreson: Publicity Chambers, 23, Charlotte Square.

LONDONA KONGRESO.

Aliĝoj ĝis hodiaŭ: 1264 el 26 landoj.

KUNVENO DE ESTRARO.

Dum la paskaj tagoj kunsidis en la IEL-Domo la jenaj anoj de la Estraro: Generalo L. Bastien, D-ro P. Kempeneers, S-ro E. Malmgren, S-ro A. C. Oliver; kaj la Ĝenerala Sekretario. Jen kelkaj el la ĉefaj decidoj kiuj estas faritaj:

Jarlibro. Oni decidis principe pri eventuala suplemento kiu aperu en la aŭtuno.

Kongreso 1939. Oni akceptis inviton de la Esperanto-Societo en Bern, Svislando okazigi la kongreson en tiu urbo venontan iaron. La invito estis subtenita de Svisa Esperanto-Societo, kiu jam decidis aliĝi al IEL.

Internacia Esperanto-Muzeo. La Estraro decidis esplori laŭeble la nunan situation tiurilate por eltrovi kio estas farebla rilate la muzeon en Wien.

Propagando. Oni akceptis proponon pri nova projekto rilate propagandon, kaj ĉe tiun interesan projekton s-ro Malmgren inaŭguros dum la Londona kongreso.

C. C. GOLDSMITH,
Ĝenerala Sekretario

Al la individuaj membroj kiuj jam pagis la kotizon 1938 la jarlibro estas jam sendita. Se iu ne ricevis ĝin, bonvolu tuj sciigi al la Centra Oficejo.

Unueco estas Forto



Sepa listo de kongresanoj

1077. S-ino B. E. Gething, Luton, Anglujo.
 1078. F-ino J. Gething, Luton, Anglujo.
 1079. S. Pugmire, Liverpool, Anglujo.
 1080. F-ino H. Steele, Southport, Anglujo.
 1081. J. L. Ford, London, Anglujo.
 1082. R. Wilson, Ellesmere Port, Anglujo.
 1083. J.E. Melville, Ellesmere Port, Anglujo.
 1084. F. Wechsler, London, Anglujo.
 1085. C.A. Oswald, Nottingham, Anglujo.
 1086. J.W. Blair, Paisley, Skotlando.
 1087. Kol. G.S. Robinson, Eastbourne, Anglujo.
 1088. L. Shipp, Southport, Anglujo.
 1089. J.F. Clayton, London, Anglujo.
 1090. F-ino G.M. Taylor, Oxford, Anglujo.
 1091. J.B. Horne, Glasgow, Skotlando.
 1092. F-ino E. Rake, Banbury, Anglujo.
 1093. J.A. Briscoe, London, Anglujo.
 1094. S-ino W.L. Briscoe, London, Anglujo.
 1095. S-ino J. Kirkup, Newcastle, Anglujo.
 1096. C. Bornstein, London, Anglujo.
 1097. F-ino M. Greaves, Gateshead, Anglujo.
 1098. F-ino M. Bainbridge, Newcastle, Anglujo.
 1099. F-ino A. Konopová, Praha, Ĉeĥoslov.
 1100. G.C. Jervis, Redditch, Anglujo.
 1101. F-ino G. Jongbloed, Arnhem, Nederl.
 1102. J. Telling, Rotterdam, Nederlando.
 1103. S-ino J.P. Willemier-Vogel, 's Gravenhage, Nederlando.
 1104. G.H.H. van Zeyl, Jrd., Arnhem, Nederl.
 1105. F-ino M.C. Oudenaarden, Rotterdam, N.
 1106. F-ino R.A. Sales, London, Anglujo.
 1107. H. Blakey, Leeds, Anglujo.
 1108. S-ino M. O'B. Harris, London, Anglujo.
 1109. F-ino E.F. Boocock, Bradford, Anglujo.
 1110. F-ino H. Morton, East Orange, Usono.
 1111. F-ino A.H. Lapidge, Richmond Hill, Us.
 1112. F-ino C.H. Teichmann, Brooklyn, Usono.
 1113. F-ino A.L. Ziener, New York City, Us.
 1114. R.T.B. Kelly, New York City, Usono.
 1115. H.F. Woolgar, Basingstoke, Anglujo.
 1116. S-ino G. Ellison, Birmingham, Anglujo.
 1117. S-ino G. Hoyle, Halifax, Anglujo.
 1118. F-ino A.B. Berry, Newcastle-on-Tyne, A.
 1119. E.J. Parkes, Willenhall, Anglujo.
 1120. S-ino N.H. Cummin, Dagenham, Angl.
 1121. J. Turner, Hastings, Anglujo.
 1122. F-ino I. Burrows, Nottingham, Anglujo.
 1123. F-ino R. Hood, Hartlepool, Anglujo.
 1124. F-ino A.C. Chambers, Hartlepool, Angl.
 1125. F-ino E. Moorcroft, Bingley, Anglujo.
 1126. S-ino E. Wright, Gateshead-on-Tyne, A.
 1127. F-ino H. E. Bone, West Wickham, Angl.
 1128. F-ino E.M. Bone, West Wickham, Angl.
 1129. W. Brown, Inglewhite, Anglujo.
 1130. S-ino Brown, Inglewhite, Anglujo.
 1131. S-ino M. Faulkner, Clagary, Kanado.
 1132. F-ino A. Hurlay, Burnley, Anglujo.
 1133. L. V. Young, Birmingham, Anglujo.
 1134. F-ino N.M. Dicks, Nottingham, Anglujo.
 1135. F-ino J. Mackenzie, Musselburgh, Skotl.
 1136. F-ino B.M. Barker, Walton-on-Thames, Anglujo.
 1137. S.H. Taylor, London, Anglujo.
 1138. S-ino K. Taylor, London, Anglujo.
 1139. F-ino E.H. Page, London, Anglujo.
 1140. E. K. Osmotherly, London, Anglujo.
 1141. F-ino M. de Jong, Rotterdam, Nederl.
 1142. D-ro P. Allocchio, Milano, Italujo.
 1143. G. Facchi, Brescia, Italujo.
 1144. I. Gilbert de Winckels, Verona, Italujo.
 1145. S-ino I. Arnaboldi ved. Guzzi, Milano, It.
 1146. F-ino D.E. Newington, London, Anglujo.
 1147. F-ino E. M. Taskinen, Helsinki, Finn.
 1148. F-ino L. Kurtto, Helsinki, Finnlando.
 1149. F-ino A.-L. Salminen, Helsinki, Finn.
 1150. S-ino N. Allen, London, Anglujo.
 1151. W. Wilkins, London, Anglujo.
 1152. W.C. May, Southwick, Anglujo.
 1153. S-ino R. May, Southwick, Anglujo.
 1154. A.G. Steeves, Ledsham, Anglujo.
 1155. S-ino C. de Z. Steeves, Ledsham, Angl.
 1156. F-ino D. Vickers, Sheffield, Anglujo.
 1157. F-ino J. McGregor, Glasgow, Skotlando.
 1158. F-ino W. Young, London, Anglujo.
 1159. F-ino M. Upton, Leeds, Anglujo.
 1160. F. Tanner, Stokenchurch, Anglujo.
 1161. V. Smith, Cardiff, Kimrujo.
 1162. F-ino L. Smith, London, Anglujo.
 1163. E. Rosson, Watford, Anglujo.
 1164. F-ino J. Hewlett, Pontypool, Anglujo.
 1165. F-ino K. O. Gedd, London, Anglujo.
 1166. R. Fielding, London, Anglujo.
 1167. T. Fairbrass, Macclesfield, Anglujo.
 1168. F-ino M. Easter, London, Anglujo.
 1169. R. Ccttingham, Leicester, Anglujo.
 1170. F-ino M. Bedwell, London, Anglujo.
 1171. F-ino A. M. Vernall, London, Anglujo.
 1172. S-ino C. D. Gallifant, Llanely, Kimrujo.
 1173. E. M. Preston, Bristol, Anglujo.
 1174. H. G. Toms, Dagenham, Anglujo.
 1175. R. Murray, Thorpe Bay, Anglujo.
 1176. E. J. Brierley, Bristol, Anglujo.
 1177. F-ino E.B. Smith, Camberslang, Skotl.
 1178. C. Veness, Ilford, Anglujo.
 1179. W.J.R. Jolley, Romford, Anglujo.
 1180. F-ino G. Flood, Reading, Anglujo.
 1181. T.E. Howard, Enfield West, Anglujo.
 1182. F-ino E. Snaith, North Shields, Anglujo.
 1183. F-ino P.C. Sinclair, Buckhaven, Anglujo.
 1184. J.G. Teare, Liverpool, Anglujo.
 1185. W. Wallis, Stoke-on-Trent, Anglujo.
 1186. M. E. Appleby, Grantham, Anglujo.
 1187. F-ino C.I. Simpson, Ilkeston, Anglujo.
 1188. H.R. Dutton, St. Helens, Anglujo.
 1189. J.P.W. Murray, Barnton, Skotlando.
 1190. S-ino A.E. Murray, Barnton, Skotlando.
 1191. W.T. Allen, Reading, Anglujo.
 1192. G.B. Tordorff, Bristol, Anglujo.
 1193. C.T. Dack, Leigh, Anglujo.
 1194. E.M. van Gelder, 's Gravenhage, Nederl.
 1195. F-ino A.H.E. van Vliet, Alphen, Nederl.
 1196. F-ino F.P. Termaat, Delft, Nederlando.
 1197. G. Largentier, Cachan, Francujo.
 1198. F-ino T. Hewes, Leicester, Anglujo.
 1199. F-ino P.W. Worden, Bishop Auckland, A.
 1200. M. Stuttard, Blackpool, Anglujo.
 1201. S-ino M. Stuttard, Blackpool, Anglujo.
 1202. F-ino L. Childs, Surbiton, Anglujo.
 1203. S-ino D. Haig, Gateshead, Anglujo.
 1204. G. Shepherd, Newcastle, Anglujo.
 1205. O.A.W. Dilke, Amsterdam, Nederlando.
 1206. W.J. Nijveld, Amsterdam, Nederlando.
 1207. A. Hansen, Kristiansand, Norvegujo.
 1208. F-ino M. Pedersen, Kristiansand, Norv.
 1209. G. Hansen, Kristiansand, Norvegujo.
 1210. F-ino M. Hansen, Kristiansand, Norv.
 1211. E. Larsson, Stockholm, Svedujo.
 1212. F-ino E. Bohlin, Stockholm, Svedujo.
 1213. E.A. Fredin, Malmö, Svedujo.
 1214. A.G.H. Arvidson, Växjö, Svedujo.
 1215. S-ino L.N. Glemminger, Malmö, Svedujo.
 1216. F-ino H.M. Hansson, Malmö, Svedujo.
 1217. F-ino G. Rådig, Stockholm, Svedujo.
 1218. S. Wiklund, Stockholm, Svedujo.
 1219. S-ino L. Reigneau, Paris, Francujo.
 1220. M. Arinal, Rouen, Francujo.
 1221. F-ino C. Lemesle, Le Havre, Francujo.
 1222. F-ino Toogood, Bristol, Anglujo.
 1223. A.P. Schild, Basel, Svislando.
 1224. F-ino A. Morrison, Glasgow, Skotlando.
 1225. F-ino B. Leopold, Arnhem, Nederlando.
 1226. F. Ferradini, Milano, Italujo.
 1227. H. Nilsson, Malmö, Svedujo.
 1228. A. Andersson, Malmö, Svedujo.
 1229. F-ino J. Johanson, Stockholm, Svedujo.
 1230. A. E. Andersson, Nossebro, Svedujo.
 1231. E. Hellmuth, Nossebro, Svedujo.
 1232. S. Segelson, Radmansö, Svedujo.
 1233. F-ino N. Thörnberg, Stockholm, Svedujo.
 1234. F-ino I. Joëlsson, Stockholm, Svedujo.
 1235. B. Joëlsson, Stockholm, Svedujo.
 1236. H.M. Thomas, London, Anglujo.
 1237. S.J. Bruce, Sheffield, Anglujo.
 1238. F-ino A.M. v. d. Graaf, Rotterdam, Ned.
 1239. F-ino E. Waller, London, Anglujo.
 1240. F-ino R. L. Heath, London, Anglujo.
 1241. F-ino M. Johnsson, Malmköping, Sved.
 1242. E. Ekström, Göteborg, Svedujo.
 1243. S-ino L. Ekström, Göteborg, Svedujo.
 1244. F-ino K.C. Wagenaar, Almelo, Nederl.
 1245. F-ino I.M. Romanowa, Warszawa, Polujo.
 1246. F-ino C.M. Scheffelaar, 's Gravenhage, N.
 1247. F-ino M. Herman, St. Niklaas, Belgujo.
 1248. A. Jansson, Göteborg, Svedujo.
 1249. F-ino S. Jansson, Lidingö, Svedujo.
 1250. F-ino E. Kraay, Den Haag, Nederlando.

Laŭlanda Statistiko de la Aliĝintoj:

Anglujo, 768; Aŭstralio, 2; Aŭstrujo, 3; Belgujo, 41; Brazilo, 3; Ĉeĥoslovakujo, 19; Danujo, 7; Egiptujo, 3; Finnlando, 6; Francujo, 87; Germanujo, 4; Hispanujo, 2; Hungarujo, 1; Irlando, 2; Italujo, 14; Jugoslavujo, 1; Kanado, 4; Kimrujo, 10; Nederlando, 65; Norvegujo, 20; Polujo, 13; Rumanujo, 1; Skotlando, 63; Svedujo, 74; Svislando, 5; Usono, 13. Entute: 1231 el 26 landoj.

La kontraŭuloj asertas

ke estas neeble enkonduki internacian lingvon, ĉar la mondo estas tro inerta por ĝenerale akcepti ĝin, ke nur miraklo kapabla baldaŭ alvenigi ĝian venkon. Tia « miraklo » tamen povus iufoje facile okazi. Ni ne antaŭvidas hodiaŭ kiaspeca ĝi povus esti.

Povus esti ke iu amerika aŭ eŭropa Krezo decidus investi sufiĉan kapitalon en tiun aferon, por poste regajni ĝin multoble: per sufiĉe da mono kaj konforma reklamo estus enkondukebla eĉ malpli grandioza afero ol Esperanto.

Aŭ povus esti ke la Monda Poŝta Unio decidus favoran tarifon por esperantlingvaj presajoj kaj korespondajtoj nefermitaj: se la redukto estus nur 10 %, ĝi jam sufiĉus por instigi la gravajn entreprenojn ĝin eluzi.

Aŭ povus esti ke tri-kvar malgrandaj ŝtatoj decidus enkonduki Esperanton en sia reciproka interrilato.

Ciu unuopa el la nomitaj « mirakloj » sufiĉus por garantii la venkon de nia afero tutmonde. Kaj ja ekzistas ankoraŭ multaj aliaj ŝancoj kaj eblecoj. Ni do trankvile atendu la « miraklon », samtempe ne pendigante la brakojn sed daŭrigante labori diligente kaj fervore por nia ideo. La venko iam, iel estas certa.

10-a Nederlanda Kongreso en Amsterdam

300 kongresanoj, multaj eksterlandanoj (angloj, belgoj, ĉeĥoslovakoj, francoj, germanoj kaj hispano). — Plena sukceso, modela aranĝo.

Sabato, la 16-a de aprilo.

Je la 4-a pm. la prezidanto de LKK, s-ro Drs. Nijveld, malfermis la kongreson. La prezidanto de LEEN, s-ro Grolleman, salutis la ĉeestantaron, i.a. dirante, ke oni kreu harmonian sferon kaj la planto de la paco bone kreskos kaj donos belajn fruktojn. Tiu devizo regis la tutan kongreson.

La reprezentantoj de la Nederlanda Instruista Organizaĵo, F.L.E. kaj Esperantista Blindula Organizaĵo esprimis siajn bondezirojn okaze de la jubilea kongreso. F-ino Korda emociplene recitis la « Preĝon sub la verda Standardo ». La LEEN-sekcio Bergen plibeligis la vesperon per bone ludata teatraĵeto « Ruzo venkos ».

Kun admiro kaj ĝojo ĉiuj sekvis la eksterordinare belan prezentadon de la majstro inter la iluziistoj, s-ro Beus (« Prof. Böss »). Kvazaŭ sorĉisto li prezentis parton el sia abunda programo, montrante la manieron de sia propagandlaboro por nia lingvo. Tiu malnova, senlaca kaj fidela pioniro devus esti petata de ĉiuj grupoj, por ke li per sia arto helpu al la propagando de nia gandlaboro por nia lingvo.

La unua kongresvespero finiĝis je la 2-a horo matene, kaj tamen la senlacaĵoj nur kontraŭvole forlasis la kongresejon.

Dimanĉo, la 17-a de aprilo.
Jarkunveno de LEEN.

La prez. s-ro Grolleman malfermis la laborkunsidon per bela parolado.

En la laborkunsido oni serioze, trankvile kaj en paca sfero pritraktis multajn asociajn aferojn. La diskutoj distingis sin per alta nivelo. Kun ĝojo oni povis sekvi la intertraktadojn, kiuj liveris impresan manieron, laŭ kiu ĉiuj Esperantaj aferoj devus esti reguligataj. Neniu atako, neniu persona antipatio, nur la bono de nia movado regis la laborojn. Multaj eksterlandaj samideanoj devus viziti la kongresojn en Nederlando, por lerni kiel debati kaj sukcese kongresi.

S-ro P.H. Mooij, la nederlanda ĉefdelegito de IEL, raportis pri la nuna stato de IEL, kaj s-ro Bakker donis interesan referaton pri la praktika aplikado de la Esperanto-propagando. S-ro Baas sciigis pri la ĝojiga stato de la oficejo « Esperanto ĉe la Instruado », al kiu ĝis nun aliĝis preskaŭ ĉiuj nederlandaj Esperanto-organizaĵoj, 13.000 geinstruistoj, inter ili multaj lernejestroj, 58 000 gepatroj kaj aliaj interesitoj. Per tio ek-

zistas nun grava centro en Nederlando, kiu serioze kaj energie povas propagandi kaj efektivi la ideon pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn. La adreso de la oficejo estas: Amsterdam-Z, C. Krusemanstraat 43, III.

La senlaca kaj sindona samideano s-ro J.D. Krispijn aranĝis en la preĝejo de Amsterdam-N. (Nieuwendam) protestantan diservon sub la gvidado de la honorinda pastro kaj fidela samideano, s-ro H. de Jong el Bergen op Zoom. La multnombra ĉeestantaro ĝuis neforgesiblajn diservojn, komencitan per orgenludo de nia himno.

Dimanĉe vespere estis komuna tagmanĝo kun la kutimaj tostoĵoj.

La festvespero.

Multe da belegaj, humorplenaj prezentaĵoj ravis la aŭdantaron. La abundriĉa programo, unu parto pli interesa ol la alia, havigis al ĉiuj multe da plezuro. Ĉiuj kunagantoj bone regis siajn rolojn, brilis per lerteco kaj spriteco. Estas vera enigmo, ke la tiom okupitaj anoj de la LKK kaj de la ĉefestraro povis fari tiom da bona laboro kaj studo. Denove la gedancemuloj estis ĝis la dua horo kune kaj senlace kaj elegante svingis siajn dancpiedoĵojn.

Lunde estis ekskursoj, kiujn mi ne povis partopreni, sed certe ankaŭ ili estis bonsukcesaj.

Julius Glück.



La propaganda Sesopo de SFPE/IEL.

Maldekstre (de supre malsupren): F-ino G. Faucher, f-ino Alvi Kalnine, s-ino Marga Rineta (s-ino M. Raymond Schwartz), s-roj P. Petit, Jean Guillaume kaj J. L. Mahé. Ni parolis pri la propaganda maniero de tiuj gesamideanoj en « Heroldo de Esperanto » n-ro 7 (963) de 20.2.1938, kaj en « Esperanto Internacia » de marto 1938. (Foto-prezentado: J.L.M.)

PROPAGANDO

Propaganda prelego farita dum la Jubilea Kongreso en Varsovio de E. Malmgren

(Fino.)

16. Koresponda kurso.

En la pasinta jaro mi atentigis vin dum mia prelego en la Viena kongreso pri la t.n. koresponda kurso. Kaj en la pasinta printempo mi havis la eblecon distribui al ĉiuj landaj asocioj la kompletan materialon de koresponda kurso. Mi ankaŭ detale klarigis diversajn reklammetodojn kaj la teknikajn aranĝojn por la ekfunkciigo en ĉiuj landoj. Mi opinias, ke la servo, kiun la Propaganda Oficejo de IEL faris per tio al la landaj asocioj, estas konsiderinda.

La angla asocio jam pretigis sian korespondan kurson laŭ la prezentita modelo. Kaj laŭ ricevitaj informoj la sperto akiritaj estas nure kontentigaj. En kelkaj aliaj landoj oni nun ankaŭ preparas la eldonon de la sama koresponda kurso. En ĉiu okazo ĉiuj landaj asocioj nun posedas la tutan materialon kaj povas kiam ajn prepari sian propran kurson.

Certe mi nun ne preterlasu la eblecon forte atentigi vin pri la graveco havi tian internacian korespondan kurson. Tiamaniere (kiel ankaŭ pere de la Cseh-kurso) la Esperanto-komencantoj posedos internacie la saman vortprovizon, kaj tio certe povos plifaciligi la korespondadon inter la diversaj landoj.

Cetere mi kelkfoje imagis, ke ĝuste koresponda kurso (kiu estas uzebla kiel instruilo ankaŭ en malgrandaj studrondoj) estas rekomendinda al diversaj internaciaj organizaĵoj, ekz. al pacifistoj, bontemplanoj, vegetaranoj ktp. Estos nome tiel ke, se la kurso aperis en diversaj landoj, la anoj de la koncernaj asocioj je la lernado de Esperanto staros sur la sama bazo jam de la komenco. Mi ankaŭ kredas, ke oni eĉ povos proponi al kelkaj el la nomitaj organizaĵoj « oficialigi » la kurson. Tio okazus tiel, ke ni prezentus al la organizaĵo la rajton anonci la kurson sub sia propra nomo en la propra asocia revuo. La asocio kompreneble pagus pli malaltan prezon por la kurso kaj surprusus sian propran nomon, sed aliflanke la asocio devigus sin fari konstantan kaj senpagan reklamon por la kurso en la asocia revuo. Per tiu maniero, ni, esperantistoj, povus jungi antaŭ la Esperanto-ĉaro ne-esperantistajn organizaĵojn. Eble la Esperanto-entreprenejoj per tio ekonomie iom malgajnus, sed tio ŝajnas al mi negrava, se oni aliflanke povus plifortigi kaj pliampleksigi la Esperanto-propagandon.

Mi do denove petas la estrarojn de la landaj asocioj serioze 1) prikonsideri la eldonon de koresponda kurso, kaj 2)

provi eluzi tiun kurson kiom eble plej grandskale.

17. Internaciaj instruist-kursoj.

Mi devas diri, ke en la lastaj jaroj mi kun granda ĝojo vidis la sukcesojn de diversaj internaciaj Esperanto-kursoj. La Internacia Cseh-Instituto de Esperanto en tiu kampo estis pionira, kaj ni ŝuldas al tiu instituto grandan dankon pro la servoj faritaj kaj farotaj.

En julio 1937 ni ankaŭ ricevis informon pri la grandaj internaciaj instruist-kursoj, kiuj okazis en Danujo. Estas mirinde, ke en tiu lando okazis ne malpli ol tri kursoj samtempe. Kaj la plej granda el tiuj kursoj havis proksimume 200 partoprenantojn! Tio montras, ke la Esperanto-movado tute ne stagnis, kion ajn diru la pesimistoj!

Sed nun, amikoj, mi opinias, ke ni devos evoluigi tiun bonan komencon. Jes, la nomitaj instruistkursoj iom post iom ŝanĝu la karakteron. Ĝis nun ni speciale bezonis kurson por eduki kaj perfektigi la instruistojn en Esperanto. Sed nun ni alproksimiĝas al tiu stado, kiam ni povos en iu certa kampo tute praktike eluzi Esperanton. Per tio mi volas diri, ke tiuj kursoj instruu ne nur pri Esperanto, pri ĝia gramatiko, historio, literaturo ktp., sed la kursoj havu pedagogie altvalorajn prelegojn kaj diskutojn pri ne-esperantaj problemoj.

Esperantistoj, vi ne povas imagi, kiajn avantaĝojn vi havas ĝuste pro tio, ke vi estras Esperanton! Ĉu vi iam partoprenis internacian ne-esperantan kurson por instruistoj? Ĉu vi rimarkis la terurajn malfacilaĵojn pro la lingva konfuzo? Sed ni esperantistoj povas racie plifaciligi la kursaranĝon. La kursaranĝantoj ja povas simple inviti iun faman pedagogon prelegi. Li prezentas jam antaŭ la kurso la skribitan manuskripton, kaj oni esperantigas ĝin. Poste la pedagogo laŭtlege la Esperanto-manuskripton antaŭ la kursanoj. Tiamaniere oni tute evitas la lacigajn tradukojn. Kaj en multaj okazoj oni certe povos interesigi la prelegonton tiom pri Esperanto, ke li pli malpli lernas nian lingvon por havi eblecon doni rektajn respondojn al faritaj demandoj.

Resume: Se oni preparas internacian instruistkurson laŭ la principoj, kiujn mi nun skizis, oni havos diversajn avantaĝojn: 1. La kursoj vekos pli grandan intereson en instruistaj rondoj pro la famaj pedagogoj, kaj tiel estos bona pro-

pagando por Esperanto; 2. La kursoj estos pli multnombro vizitataj pro la altvalora enhavo; 3. La kursoj eble povos interesigi famajn pedagogojn pri Esperanto, kaj de tio ni havos grandan utilon estonte.

18. Efektivigu la projektojn!

Kiel ruĝa fadeno en ĉiuj el miaj proponoj sin trovas la intenco uzi Esperanton en la praktiko. Jes, mi priparolis kun vi kelkajn tiajn problemojn. Sed mi bone scias, ke restas ankoraŭ multaj aliaj. *Vi eltrovu ilin!*

Sed la plej ĉefa pri miaj proponoj kiel ankaŭ pri viaj propraj proponoj estas, ke vi ne lasu ilin esti kaj resti nur projektoj, sed ke vi praktiku ilin! Unu bona ideo jam realigita en la praktiko estas multe pli valora ol cent bonaj ideoj en la teorio!

Kaj nun, karaj amikoj, kiam ni renkontiĝos en la Londona kongreso, ni raportu pri niaj spertoj dum la jaro, kaj pri la sukcesoj kaj malsukcesoj.

Ni promesu al ni mem fari kiom eble plej multe por la Esperanto-movado, tiel ŝatata kaj amata de ni ĉiuj!

La kontraŭuloj asertas

ke Esperanto estas identa kun bolŝevismo, kaj ke la insigno de l' esperantistoj — la kvinpinta stelo — estas identa kun la sovet-stelo. Tio estas simpla mensogo. Unue, la Esperanto-stelo estas verda, la sovet-stelo ruĝa. Due, la Esperanto-stelo ekzistis jam delonge, kiam ankoraŭ neniu songis pri bolŝevismo kaj sovetoj. Trie, la kvinpinta stelo ĝenerale estas pramalnova mistika signo (= pentagramma), signifanta sanon, aŭ protekton kontraŭ malbonaj influoj. Mezepoke ĝi nomiĝis en Germanujo « Drudenfuss » = drudpiedo — drudo = sorĉist(in)o — kaj servis kiel magia signo kontraŭ la influo de malbonaj spiritoj. Kvare, oni povas atentigi pri la fakto, ke la kvinpinta stelo servas kiel insigno de la itala faŝista armeo (arĝentkolora), kiel signo de ŝipkompanioj (eĉ ruĝa! « Red Star Line » = Ruĝa-Stelo-Linio), kaj ke ĝi troviĝas sur multaj blazonoj mezepokaj kaj novtempaj, kaj sur multaj naciaj standardoj. Blankajn stelojn ni trovas, ekz., sur la standardoj de Ĉilio, Egiptujo (3), Kubo, Liberio, Turkujo, Usono (48 blankaj steletoj, signifantaj la 48 ŝtatojn de Usono); ruĝan sur la standardo de Tunio; bluan kaj ruĝan sur la standardo de Panamo. Se ĉiuj ĉi steloj ne estas identaj kun la sovet-stelo, kial aparte al la Esperanto-stelo oni volas atribui tiun identecon? Ne ekzistas eĉ ŝajno de praveco por tio. Tia aserto estas nura kaj tre evidenta mensogo.

La Esperanto-Literaturo kreskas

Jarlibro 1938. (Internacia Esperanto-Ligo.) 349 p., 11,5x15,5 cm. Neaĉetebla sed ricevebla nur por individuaj membroj de IEL. Bazaj kotizoj: MJ (membro kun jarlibro) 4 angl. ŝil., MA (membro kun jarlibro kaj monata organo) 10 ŝil., MAH (membro kun jarlibro kaj semajna organo) 19 ŝil., MS (subtenanta membro) 25 ŝil. En kelkaj landoj specialaj kotizoj en la landa valuto. Aliĝiloj haveblaj ĉe Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth Anglujo, aŭ ĉe landaj ĉefdelegitoj kaj perantoj. Anstataŭ recenzon, vidu artikolon en la hodiaŭa numero!

Dr. Karl' Moci: La Supermono, la solvo de la monmanko. 16 p., 15 x 22,5 cm. Eldono de l' aŭtoro, Dr. K. Moci en Mociu (jud. Cluj), Transilvanio, Rumanio. Prezo 0.30 sv.fk. aŭ unu respondkuponon.

D-ro Moci donas interesan studon pri la eblecoj, krei pli multajn pagilojn (mon-anstataŭigilojn) baze de la monrezervo en publikaj kasoj kaj baze de la publikaj budĝetoj. Per la kreo de tiaj novaj pagiloj (ĉek- kaj kambio-karakteraj, la t.n. « Supermono ») oni povus plivastigi la kreditojn sen inflacio, kaj algrade eviti krizojn, kiuj ĉefe ja estas monkrizoj.

Estus utile, interesiĝi pri tiu ĉi broŝuro financajn rondojn kaj eldoni ĝin ankaŭ en kiel eble plej multaj nacilingvaj tradukoj.

Pro la graveco de la enhavo ni fermu okulon pri la lingvaj elreliĝoj (ofta manko de subjekto, eraruzo de « nek », eraruzo pri la refleksivo, ankoraŭ ne permesita aplikmaniero de l' particip-adverbo). Malgraŭ ili, la senco ĝenerale restas klara. M.

F. V. Dorno: La aventuroj de L. R. M. Stultulof la Xa. Kun du ilustraĵoj de la aŭtoro. 64 p., 14,5x19 cm. — Prezo 9 pencoj aŭ 0.35 guld., de: Centra Deponejo O.E.L., Batelschesteinweg 303, Mechelen, Belgio.

Jam la titolo anoncas la enhavon de tiu ĉi libreto. Ĝi estas satiro, iuloke atinganta ĝis grotesko, pri la vivo de homo ne tro kapbla, kiu lia deveno destinas esti la patro de popolo, kiu tamen estas vante konvinkita pri siaj kvalitoj kiel reganto, kaj kiun la popolo cetere entuziasme aklamas. La aŭtoro rakontas en interesa maniero la «aventurojn» de sia «heroo»: liajn dilemojn en la reprezentaj devoj, liajn zorgojn pri la laŭreĝsanga edzino de la filinego ne tro dotita per belegeco aŭ aminda konduto, la ferik-«ĝojojn» ktp. Plej groteske estas, kiam L.R.M. estas arestata kiel kunulpulo pro atenco kontraŭ la propra reĝamoŝta persono, atenco farita dum prezentado en publika teatro. Satire trafa ankaŭ la fino, kiam Stultulof de fuŝio unuafoje uzas la skribilaron, donacitan al li de la laboristaro okaze de lia naskiĝtago, por subskribi dekreton pri nova imposto sur la pano!

Plendinde tamen estas, per kia senzorgeco oni traktis la manuskripton kaj la presprovaĵojn de tiu ĉi rakonto.

Legado de la libreto certe donos plezuron; sed estos nepre necese, aldoni folion, sur kiu oni korektos almenaŭ la plej evidentajn pretervidojn. M.

Nia helplaboro en Hispanujo — Savado de la infanoj. 12 p., 14x21,5 cm. Ilustritaj informoj, eldonitaj de Internaciano de Militrezistantoj en Enfield, Middlesex, 11 Abbey Road, Anglujo, pri helplaboro en Hispanujo meze de la milito, pri la hejmo por rifuĝantaj infanoj starigita de la I. d. M. en Francujo, kaj kun kortuŝa letero de 13-jara hispana knabo. La sama I.d.M. eldonis ankaŭ prospektajn pri sia celo kaj siaj laboroj. Interesuloj sin turnu al la internaciaj renkontejoj. Sendube ankaŭ tiun ĉi citita adreson.

Konkordanco al la Originala Verkaro de Zamenhof. Kompilita de Fento Stancliff. (Reprezento el Scienca Gazeto.) 50 p. 14,5x22 cm. Prezo 0.40 dol. afr. ĉe Amerika Esperanto-Instituto, Rockford, Illinois, Usono.

Fento Stancliff estas kvazaŭ la oficiala statistikisto de la Esperanto-movado, koncerne la kalkuladon de vort-ofteco. Ĉiu scias, kiel grava povas esti statistika laboro; sed ĉiu scias ankaŭ, kiel penega kaj sennerviga ĝi ofte estas. Tial nia fervora usona samideano, kiu oferis tagojn kaj noktojn, monatojn, eĉ jarojn por tiaj laboroj, estas nepre subteninda en sia penado.

L.L. Zamenhof: Essência e futuro da idéia de Língua Internacional. Tradukoj kaj notoj de Ismael Gomes Braga. — 86 + XXXI p. 12,5x19cm. Prezo 4 milreĝoj. Eldonis «Lingua Auxiliar», Rio-de-Janeiro, Brazilo. — La libro estas portugallingva traduko de la konata artikolo de Unuel (= Zamenhof) el la Fundamenta Krestomatio, pri la esenco kaj estonteco de la ideo de Lingvo Internacia. I. Gomes Braga aldonis al la teksto klarigajn notojn.

Vocabulário Esperanto-Português (Raízes oficiais). Esperanta Radikaro (oficialaj radikoj) kun portugala traduko de A. Couto Fernandes, Prezidanto de Brazila Ligo Esperantista. Tria eldono. — 69 p. 12,5x18,5 cm. Prezo 2 milreĝoj. Presejo Fratoj Pongetti, Rio de Janeiro, 1938. Havebla de Liga Esperantista Brasileira, Praça da República 54, Rio-de-Janeiro.

Yosikatu Sibata: La Verda Stelo rigardata el la Ekstrema Oriento. (Intimaj Paroloj de Nova Plugisto.) Esperantigis Kinsyoo Siraki. — 76 p. 13x19 cm. Prezo ne montrita. Eldonis Esperanto-Asocio, 2 Teppoo-Tyoo, Nagoya, Japanujo.

Adalberto Bangha S.J.: Vivo de nia vivo. Pensoj kaj meditadoj pri la plej sankta Altar-Sakramento. Esperantigis Margareto Bolváry S.J.C. 54 p. 11,5x16,5 cm. Prezo 2 resp.-kuponoj. Aperis sub la signo de la Eŭkaristia Kongreso 1938, ĉe: La Ligo de Jesu-Koro, Maria-str. 23, Budapeŝt VIII., Hungarujo.

La Turo pri Honoro al la flandraj herooj en Diksmuide. 16 p. kaj kovrilo, 13,5 x 21 cm. Broŝuro, kiu traktas en bona esperantlingva traduko pri la flandra konsciigo dum la mondmilito, pri la ĉiujare kreskantaj laŭnombre pilgrimadoj al la tomboj ĉe la Izero, kaj pri la Izer-monumento, la «Turo pri Honoro al la flandraj herooj», en Diksmuide. La broŝuro estas bone presita kaj ilustrita per 17 bildoj kaj unu situplano. Ricevebla laŭdezire en lingvo angla, franca, esperanta, germana aŭ nederlanda (senpage) de: Sekretariejo pri Izer-pilgrimado, Maria Dolaeghestraat 39, Diksmuide, Belgio.

X-a Sokola Kongreso, la ĉefa kultura okazaĵo de Eŭropo 1938, Praha, Ĉeĥoslovakio, Junio-Julio 1938. Prospekto eldonita de la Ministerio de Komerco. 12-paĝa, 21 x 19 cm. Kolora titola bildo, montranta stadionon, en kiu okazas sokol-prezentadoj; unu sokolo (gimnasto) staras en la antaŭaĵo. Internaj bildoj tre imponaj pri diversaj sokol-prezentadoj estas fotopresitaj. Akompana teksto en Esperanto. La lasta paĝo montras, denove en kolora preso, la ŝtatan Masaryk-stadionon en Praha. — Oni petu la prospekton senpage de: Oficejo de X-a Sokola Kongreso, Náměstí Republiky, Praha II, aŭ de: Ĉeĥoslovaka Esperantista Informejo, Uralské 9, Praha XIX.

Poŝtkarto, nigra preso, kun vinjeto de viro svinganta verdan standardon kaj Esp.-teksto. Prezo por 10 ekz. 2 resp.-kuponoj, 100 ekz. 16 resp.-kup. aŭ 50 din. Eldonis: «Niaj Vizaĝoj», Reslova 29, Ljubljana, Jugoslavio.

London & North Eastern Railway, London, eldonis (okaze de la 30-a Univ. Kongreso) 4-paĝan ilustritan prospekton en Esperanto pri fervojaj kaj ŝipaj interkomunikoj inter Londono kaj la ĉefaj lokoj de la kontinento.

Venu al Weston, la angla marurbo, fama pro «aero ĉampana». 4-paĝa prospekteto sur luksa papero kun 3 ilustraĵoj. Dezirante ricevi oficialan gvidlibron aŭ pliajn informojn, oni turnu sin al s-ro V. Turner, Publicity Manager, Weston-super-Mare, Anglujo.

Postkongresa rondvojaĝo en Skotlando. 4-paĝa prospekto en verda preso kun du ilustraĵoj, pri postkongresa rondvojaĝo en Skotlando (6-12.8.) kun vizito al la Britimperia Ekspozicio en Glasgovo.

Internaciaj FERIAJ Esperanto-Kursoj en Helŝingó, Danlando, somero 1938. — 4-paĝa prospekto ilustrita pri la jam famiĝintaj somerkursoj en la Hamlet-urbo: Internacia kurssemaĵo 16-24.7., kaj 10-taga internacia ferio esperantista 15.25.8. Petu la prospekton de s-ro L. Friis, Thyrasvej 15, Aabyhøj, Danlando.

Esperanto. 10-taga internacia restado lagorda en Ry Popola Altlernejo inter Aarhus kaj Silkeborg, Danlando, 31.7-10.8.1938. — 4-paĝa prospekto ilustrita. Ricevebla de Harald Grönberg, Rosenvej 8, Risskov, Danlando. — Ĉe la sama estas ricevebla ankaŭ serio de ilustritaj kartoj (nigraj aŭ koloritaj) pri la regiono de Ry, kun Esperanto-tekstoj (5 diversaj vidaĵoj).

Partoprenu la XX-an IKUE-jubilean kongreson en Ljubljana, 6-11.8.1938, Jugoslavio. Ekskursplanoj. — 4-paĝa prospekto montranta belan ilustraĵon de Bled kaj la programon kaj prezojn de dek belegaj ekskursoj. Ricevebla de «Niaj Vizaĝoj», Reslova 29, Ljubljana.

Jesenice, Gorenjsko, Jugoslavio. 8-paĝa faldprospekto verde presita, kun 11 ilustraĵoj. Eldonita de «Niaj Vizaĝoj», Ljubljana, Jugoslavio. — La prospekto utilos precipe al la vizitontoj de la nunjara IKUE-kongreso, sed ankaŭ al ĉiuj kiuj interesiĝas pri Jugoslavio — lando de serboj, kroatoj kaj slovenoj —, kies belaj estas ĝis nun tro malmulte konataj.

Esperanto our second tongue. (Esperanto nia dua lingvo.) Anglalingva varbilo 4-paĝa, lukspapera, bone presita. Eldonita de: Esperanto Society of Detroit, 4321 Fourth Ave., Detroit (Mich.), Usono.

Kuusitoista ajankohtaista syytä kansainvälisen apukielen kiireellisen käytäntöönottamisen puolesta. (Finnlingva fluglibreto: deksek aktualaj kialoj por la rapida enkonduko de l' internacia helplingvo.) 23 p. 9,5x14 cm. Eldonis: Uudenkaupungin Sanomalehti- ja Kirjapaino O.Y.

Raittäsväki yhteisrintamaan alkoholismia vastaan. Finnlingva flugfolio pri la valoro de Esperanto por la batalo kontraŭ alkoholo. Kun esperantlingva klarigo. Verkis H. Salokannel.

Esperanto on monille ihmisille vain harrastus. Flugfolio pri Esperanto kaj Esperantokurso en Kokemäki. Verkis H. Salokannel.

Hura! Al la Junulara renkontiĝo! Poŝtkartoj kun tri bonhumoraj vinjetoj: «La Fluganta Holandano»; knaboj kiel indianoj; promenantoj kaj limako. Prezo po 4 ned. cendoj, favore al la Esperanto-junulara renkontiĝo en Nederlando. Eldonis Libro-Servo FLE, Postbus 4050, Amsterdam O., Nederlando.

27-a Belga Kongreso de Esperanto

La Reĝa Belga Ligo Esperantista, kies honora prezidanto estas Lia Reĝa Moŝto Leopoldo III-a, organizas sian 27-an kongreson dum la pentekostaj tagoj, en la bela kaj industria valona urbo **Charleroi**.

S-ro Joseph Tirou, urbestro de Charleroi, akceptis la honoran prezidantecon de la kongreso, dum s-roj Jean Laurent, distrikta komisararo, kaj Georges Dryon, skabeno de publika instruado, estas honoraj komitatanoj.

La programo komenciĝas sabate, je la 14-a, per la malfermo de la akceptejo, kaj anoncas plie por la sama tago laborkunsidon kaj interkonatiĝan vesperon, dum kiu parolados s-ro Paul Blaise el Londono.

Dimanĉe — post eksterprogramaj diservoj, katolika kaj protestanta, kun Esp.-prediko — kongresa kunsido, oficiala akcepto de la urbestro, vizito de la nova urbdomo, fotografado, vizito al la Monumento de la Militmortintoj, komuna tagmanĝo, vizito de la « Universitato de la Laboro » de la subteruloj, fabrikejoj, muzeoj. Vespere: festeno, grandioza balo, kun baletoj de la dancistinoj de la Reĝa Bruĝa Grupo Esperantista.

Lunde: tuttaga ekskurso en la belega Ardena Regiono, al Couvin, al Chimay kun haltoj en diversaj vidindaj lokoj, nome en La Trappe (vizito de la Abatejo). En Chimay, akcepto de la urbestro, komuna tagmanĝo, vizito de la kastelo kaj promenado al la lagetoj de Virelles. Reveno al Charleroi.

Kostoj: kongreskarto 15 fk.; dimanĉa tagmanĝo 12,50 fk.; dimanĉa festeno 32,50 fk. lunda ekskurso 30 fk.; lunda tagmanĝo 15 fk. Oni petu aliĝilojn kaj informojn pri loĝado senpere de la LKK ĉe s-ro N. Molle, 55, rue de la Montagne, Charleroi, aŭ pagu tuj la necesan sumon al la poŝtekkonto 1119.10 de la 27-a Belga Kongreso de Esperanto, Charleroi.

Jam nun la nombro de aliĝintoj superas 100. Tiu nombro ankoraŭ du- aŭ triobligos. Estas do konsilinde por ebligi taŭgan organizadon kaj komfortan loĝadon, ke oni aliĝu kiel eble plej baldaŭ.

C. P.

Grandskalaj Esperanto-Festoj en Danujo je Pentekosto

La dana Esperanto-movado aranĝos dum la pentekostaj tagoj (5.-6. junio) 1938 grandan jarkunvenon en la sudselanda urbo **Næstved** — en la 30-a jaro de Centra Dana Esperantista Ligo.



Jam antaŭ unu jaro la lokaj Esperantistoj komencis la preparon. Oni aranĝis kunlaboron kun la loka gazetaro, turista unuiĝo ktp., kaj nun la programo estas difinita jene:

La 5.6.1938 antaŭtagmeze okazos la solena malferma festo per prelegoj kaj kanto en Esperanto. Post tio la programo estos triobla: 1) Ĝeneralkunveno de C.D.E.L.; 2) fakaj paroladoj kaj diskutoj en Esperanto pri propagando, instruado ktp.; 3) ekskursoj en- kaj eksterurbo. La tago finiĝos per komuna festo kaj granda Esperanto-balo. Inter la dancoj la speciale verkita « jarrevuo » estos prezentata.

La 6.6.1938 estos aliaj kunvenoj kun fakaj prelegoj kaj rondveturado tra la sudselandaj belegaj regionoj.

En la tagoj 3.-6.6.1938 Esperanto-Ekspozicio estos malfermita kaj por la esperantistoj kaj por la Næstved-anoj.

Dum la lastaj jaroj nia movado vaste progresis en Danujo, kaj certe la nombro de la partoprenantoj estos granda. Ĉiu esperantisto — eksterlanda aŭ enlanda — estu kore bona al la jarkunveno. Jam aliĝis multaj, ankaŭ el eksterlando! Oni turnu sin al la oficejo de la jarkunveno: Thorsvej 9, Næstved. (Giro 48013.)



En Kokemäki (Finnlando) finiĝis Esperanto-kurso kun 25 partoprenintoj, kiun gvidis laŭ la Cseh-metodo la Esperanto-instruisto Eino Looŝits. (Maldekstra bildo, supre; la instruisto sidas en la meza vico = tria sidanto de maldekstre.) — En Katalunujo eĉ la milito ne sukcesis haltigi la Esperanto-vivon. Tion pravas la bildo (maldekstre malsupre) de « Vilafranca Esperanto-grupo », fondita post kurso de s-ano J. Grau Casas en Vilafranca del Penedès. — La bildo supre dekstre prezentas la novan konstruaĵon de « Neutrale Europeese Lagere School » (neŭtrala eŭropa elementa lernejo) en Batoo (Nederlanda Hindujo), kies estro, s-ro J.F.L. Lumaye, estas samideano kaj enkondukis Esperanton en la 6-an kaj 7-an klasojn de la lernejo (partoprenas 25 gelernantoj, el kiuj 8 jam multe korespondas kun eksterlandaj infanoj). La lernejo vizitas 98 infanoj. La dekstra alkonstruaĵo estas internejo por 10 lernejanaj; super ĝia angulpordo (tute dekstre) troviĝas la esperantlingva surskribo « Nia Hejmo », bedaŭrinde ne videbla sur la bildo. — Fine, la bildo dekstre malsupre montras la partoprenintojn de jubilea kurso aranĝita de « Vekigo » en Ŝumen (Bulgarujo).

Helpvoko el Sud-Afriko

Ĝis nun en nia sunluma Sud-Afriko preskaŭ nenio estas publikigita pri Esperanto. Ne ekzistas Esperanto-movado, kaj estas nur du aŭ tri delegitoj.

Antaŭ ses monatoj mi decidis labori por plivastigi nian lingvon. Mi verkis du artikolojn, unu anglalingvan, la alian sudafriklingvan. Vi devas scii, ke Sud-Afriko estas dulingva lando aŭ, pli ĝuste, multlingva, ĉar estas diversaj indiĝenaj lingvoj. Antaŭ tricent jaroj parto de la lando estis nederlanda posedaĵo, kaj enkondukiĝis la nederlanda lingvo. Multaj francaj rifuĝintoj ankaŭ trovis tie novan patrujon. De pli ol unu jarcento Anglujo estis la mastro en Sud-Afriko, ĝis la jaro 1910, kiam fondiĝis la Unio de Sud-Afriko, kaj la ligiloj kun Anglujo pli malpli liberiĝis. La sudafrika lingvo similas al la nederlanda simile kiel la flandra lingvo en Belgujo.

Mi skribis do la du artikolojn, kun malsukceso. La anglalingvaj gazetoj ne volas akcepti novaĵojn pri Esperanto; sed tiujn malprogresulojn ni venkos. Pri la sudafriklingvaj gazetoj okazis pli da sukceso, kaj tri redaktoroj jam akceptis, aŭ promesis konsideri artikolojn pri nia lingvo.

Sed mi urĝe bezonas pli multajn armilojn por daŭrigi kaj venki la batalon! Tial mi petas la tutmondan esperantistaron sendi al mi ĉian materialon, kiun ili havas disponebla — gazetojn, ĵarlibrojn, propagandaĵojn, leterojn, fotografajojn ktp. — por ebligi al mi la aranĝon de ekspozicio.

Helpu fondi esperantistan kernon en Sud-Afriko! J. Semmelink, Membro de IEL,
c/o A.C.K.I., Postbox 1246, Pretoria
(Transvaal), Sud-Afriko.

Ni funebras

— Prof. Prelato A. DAMBRAUSKAS (Dombrovski) en Kaunas (Litovio) mortis la 19.2.1938, 77-jara. Esperantisto de 1887, li fariĝis pioniro de la mondlingva movado de Litovio, eksprezidanto kaj honora prezidanto de Litova Esperanto-Asocio, membro de la Lingva Komitato, kaj poeto. Ekzilito dum 1889-1895 de la rusa registaro, li verkis en Tilsit (Germanujo) 1890 la unuan Esperanto-lerolibron por litovoj. Li estis ankaŭ dumviva abonanto de « Heroldo de Esperanto », kiun li abonis de la komenco de ĝia apero. La tuta esperantistaro konservas al tiu pioniro plej horoan memoron.

— F-ino E. M. BARTHOLOMEW forpasis la 18.3.1938 en Letchworth, Anglujo. Kun sia fratino Frances, kiu mortis antaŭ unu jaro, tiu ĉi samideanino dum jaroj favore subtenis nian movadon. Ŝi estis Dumviva Membro, Membro-Subtenanto, kaj Patrono de IEL.

— S-ino MARIA DE KETELAERE-WOUTERS, edzino de s-ro Morris De Ketelaere, administranto de Belga Esperanto-Instituto en Antwerpen, Belgujo, mortis la 20.3.1938, postlasante kvar infanojn 2-9-jarajn. Kun la funebra familia profunde kunsentas la belga kaj la tutmonda samideanaro.

— La 4.2.1938 mortis en Sud-Aŭstralio samideano W.L. WATERMAN je la aĝo de 68 jaroj, kiu dum multaj jaroj estis fervora laboranto por nia movado en tiu mondparto. Ni kore kondolencas al liaj familianoj, kaj al la samideanoj en Sud-Aŭstralio, kiuj nepre sentos la forpason de ĉi tiu senlaca batalinto.

D-ro inĝ. Eugen Wüster :

Internacia skribnormigo

(Aparte presita el kajero 4, jarkolekto 1937, de « Sparwirtschaft » = « Ekonomia ŝparanta », revuo por ekonomia funkciado.)

Fonetikeco nacia. De ortografio iulingva plej trude oni postulas, ke ĝi estu laŭeble tre fonetika. Tio diras: al ĉiu lingva sono (pli ekzakte: « fonemo », « son-intenco ») konformu unu sola sonsigno, kaj inverse.

El sekvanta tabeleta de *Lendle* ¹⁾ klariĝas, kiom nesufiĉe la nuna skribado modernlingva kontentigas tiun postulon:

	kiom da sonoj	kiom da literoj (grupoj) uzataj por signadi tiujn	proporcie
angla	43	206	1 : 4.8
germana	41	92	1 : 2.24
nederlanda	46	84	1 : 1.8
sudafrika	41	59	1 : 1.44
sveda	40	81	1 : 2
dana	42	71	1 : 1.7
norvega			
Riksmål	39	77	1 : 2
norvega			
Landmål	38	57	1 : 1.5

Eĉ se oni en iu lingvo iam uzadis en certa epoko perfekte fonetikan skribon, ties fideleco al la sonoj dum tempopaso cedas paŝon post paŝo. Ĉar la vortindivida prononco konstante ŝanĝiĝas; kvankam la skriboformoj persistas, ĝis ilin ortografia « reformado » *malĉkontinue* realĝustigas por lasta evolua fazo de l' koncerna lingvo. Tiaj adaptoj ĝenerale ekvivas per iu « reformismo » ilin aspiranta, kiu daŭre akiras forton kaj fine sin respektigas.

Internacia unuformeco. Fidele al sonoj de la gepatra lingvo estas gravaĵo por la *tuta* samlingvanaro. Sed por ties parto, kiu lernas aliajn lingvojn krom sia gepatra, jen dua postulo gravas:

Internaciaj vortoj laŭeble en la gepatra lingvo plej samaspektu kiel en la aliaj lingvoj.

Tiun postulon (havi internacian unuformecon grafisman) nia tempo eble kontentigas nur laŭ grado, kian sinoptike ilustras ankaŭ *Lendle*; jen :

angla	construction
germana	Konstruktion
nederlanda	konstruktie
norvega	konstruksjon
sveda	konstruktion
dana	Konstruktion

franca	construction
itala	costruzione
hispana	construcción
rusa	konstrukzija
pola	konstrukcja
ĉeĥa	konstrukce.

Do parte egalas la prononcoj internacie, sed diferencas la grafismo (*ko ... co, kt ... ct ... kz ... kc ... ks*). Parte okazas ĝuste la malo (kp. *u* resp. *ct* en la vortoj angla kaj franca).

Reformi la skribadon. La sinoptiko klare montras laŭŝanjan neakordigeblon de la du postuloj: fonetikeco kun internacia unuformeco grafisma. Reformante oni en Germanujo substituis la antaŭan *Co* per *Ko*, en Hispanlando *ti* per *ci*, kaj tiel la nacian sonfidelon ja gradaltigis, sed kompanse la skriboformon forŝovis de la komuna fontoformo latina *constructio*, do ankaŭ de l' formoj en preskaŭ ĉiuj lingvoj latinidaj.

La saman fakton eĉ pli evidentigas provoj, aranĝi fonetikan ortografion en la angla lingvo; de antaŭ nelonge oni menciadas precipe sistemon de *Zachrisson*, sveda scienculo, en ies skribmaniero *soeshl, uenivurshl, komurshl* anstataŭas la ĝisnunajn formojn *social, universal, commercial*.

Kombini ambaŭ vidpunktojn. En efektiveco oftkaŭze estas akordigebla la fidele al naciaj sonoj kun internacia unuformeco grafisma. Estas necese nur, ke ekĉesu la ĝisnuna metodo plibonigi ortografion de ĉiu aparta lingvo ne samtempe zorgante pri analogaj klopodoj alilandaj. Ni bezonas internacian skribnormigon.

Por tio vere necesas preparaj laboroj pli malfacilaj, ampleksaj, ol por reformi sole nacian skribadon. Koncerne la lingvojn ĝermanajn — kune kun la angla — antaŭ nelonge fundamentan verkon kun taŭgaj konkludoj publikigis *O.C. Lendle: Ortografio de l' ĝermanaj lingvoj, kaj kiel ĝin samnormigi*, Kopenhago 1935 ²⁾. Vidante la malfacilegon la verkinto metis limon al la tasko provizore je unu sola lingvofamilio, kaj inter ĝi estis la vokaloj, kiujn li precipigis

Ĉu internacia fidele al sonoj? La sinoptiko de la naciaj vortnuancoj de *konstrukcio* komprenigis, ke la internacia unuformeco estas duopa: jen internacia skriba samformo, jen internacie sama prononco de literoj (internacia sonfidelo). Kombini ambaŭ specojn oni nur povus ĉe la maloftaj vortoj kun prononco internacie egala.

Ĉe la ceteraj kazoj necesas decido, kian unuformecon oni preferu, ĉu la internacian skriboformon, ĉu la internacian literprononcon. (La sonformo de la vortoj ne povas esti ŝanĝata en vivanta lingvo.) Kion preferi?

Tiu demando cetere respondebligis: Preferinda estas internacia *grafismo*, kiom ĝi povas akordi kun fidele al naciaj sonoj. Angla vorto *social*, skribata *soeshl*, por neniu farus pli facila la lingvon. Kontraŭe; tiel eĉ malaperus la konebla konekso restinta kun lingvoj eŭropkontinentaj. En tiaj kazoj internacia skribnormigo devas « normigi internacie la skriban signoformon ».

ISA-kodo. Tion celante la internacia skribnormigo tre najbariĝas al kreo de internacia kodo, kian ekverkadis Internacia Federacio de Normigaj Komitatoj (ISA) ³⁾, almenaŭ al tiu « naturalisma tendenco » inter kodo-fakuloj. Ĉar vere ĉi tiu klopodas kompiladi normajn skriboformojn el latin-romanida fonto (sed iel principe sin limigante laŭ propraj gramatiko kaj vortderivo regulaj).

Tamen estas principa diferenco inter kodo kaj internacia skribnormigo: Tiu ĉi ellaboras skribon plej konvenan por la naciaj lingvoj, pro necese tolerante la sonformojn de l' nacilingvaj vortoj kiel efektivaĵojn. Kontraŭe la kodaj vortoj reale ekzistu nur absolute-internacie (ili estu bondifinitaj signovortoj por internacia komunikigo), tial eble konkretiĝantaj en internacie sama sonformo, egala al neniu vorto nacia.

Tial ebligas por kodo io, kio ne estas ebla por internacia skribnormigo nacilingva, nome: aldoni al la internacia skriba vortformo internacie normigitan prononcon de ĝiaj literoj.

Fidele al sonoj naciaj kun internacia grafismo malfacilege akordiĝas en lingvo, kiu la saman literon paroligas tre diference, kiel la agla tiujn por vokaloj. Ekz. *father* « patro », *volcanic* « vulkana » — ambaŭ anglaj vortoj enhavas literon a tiuloke, kie la aliaj lingvoj en ties respektivaj vortoj samdevenaj. Tamen ambaŭ a en la anglaj vortoj estas prononcataj salsame (longa a, mallonga e).

En tiu kazo *Lendle* ekuzas rimedon, kiun jam ankaŭ la verkinto de ĉi tiu artikolo trovis kiel solan eblon ⁴⁾, inkludi la anglan lingvon en la internacian skribnormigon. Devus aplikigi kromsignaro, sed la literoj *sen* kromsignoj esti rezervataj laŭeble por signi plej internacian prononcon. *Lendle* ekz. proponas skribi *father* kaj *volcānic*. La kromsignoj ne ĉiuj devas esti supersignoj, kia ĉe *Lendle* ekz. ankaŭ *ù* (por angla mallonga *u*, al a simila); sed ankaŭ *helpliteroj* apudantaj: ekzemple ĉe *Lendle* *ie* por angla sono *i*, *oo* por longa *o* nediftonga, *ue* por sono *ju*. Elektiĝis tiuj suplementoj tiamaniere, ke ili aludas la

ĝis nun uzatajn literojn en la propra lingvo (*ie* en la angla memorigante la ĝisnunan *e*) aŭ la jam nun kutimajn en parencaj lingvoj (*ä, ie*).

Frapas, ke ĝis nun ŝajne neniu alia reformanto de l' skribo praktikis tiun ĉi unusolan eblon, unusensigi la anglan ortografion ne rezignante la internacian grafismon.⁵⁾

V o k a l a l o n g e c o. El riĉego da proponoj, kiujn *Lendle* prezentas por la diversaj lingvoj ĝermanaj, ni citu almenaŭ iun plenan ekzemplon: Oni scias, ke pledantoj por pli perfekta ortografio germana ne sukcesas interkonsenti pri unuforma elmontrado de vokala longo resp. mallongo. En la ĝermanaj lingvoj ja ĝenerale la pluro da longigiloj (duobla vokalo, h, e, sekventa sz) kaj mallongigiloj (duobla konsonanto sekventa) konfuzete kaosas.

Nu, *Lendle* konkludas la kutimon en ĉiuj lingvoj ĝermanaj, elparoli vokalon mallonge, se ĝi troviĝas ankaŭ du konsonantoj (eĉ malsamaj); kaj oni do normigu tiun esprimilon kiel solan. Havante fiksitan signon por mallongo — li diras — oni ne krome bezonas longigilon: germana *Falle* « kaptilo » ... *fale* « palaj » (ĝis nun *fahle*), eĉ *Masse* « maso » ... *Mase* « mezuroj » (ĝis nun *Masse*).

Vere rimarkinda solvo; ĉar ankaŭ en ambaŭ planlingvoj plej disvastiĝintaj (*Esperanto* kaj *Occidental*) por la relativa longeco de la vokaloj estas unusenca kaj ununura regulo la nombro da konsonantoj ilin sekvantaj. Tiu ĉi signifilo, por la vokala daŭro efektive restis la sola, kiun aplikadas ankaŭ lingvoj eĉ neĝermanaj.

P e r s p e k t i v o. *Lendle* certe konscias tute pri la nur iom-post-ioma efektiveblo de siaj proponoj, eventuale dum daŭro eĉ de jarcentoj. Nu, ĝuste ankaŭ tio, ke li pripensadis la proponojn psikologie, ne nur laŭ lingva tekniko, konsistigas ilian valoron. Ĉiu aparta paŝeto proponita preskaŭ facile efektiviĝos, se ĝis la sekvanta oni lasados sufiĉan tempon. Sed pleje gravas, ke ĉiulande ĉiuj marŝu en sama direkto.

Ankaŭ ĉe la efektivigado skribnormigo kaj kodo principe diferencas: la kodo estas realajo nur internacia. Tial ĝi ne tiel tuŝegas la vivon ĉiutagan; kaj do la malfacilaĵoj, barantaj ĝian enkondukon praktike kaj organize ne tiom pezoz. Sur la nuna ŝtupo estos jam atingebla internacia skriboformo kaj relative alta grado de sona fideleco. Perfektan sonfidelon oni ja nur havos — dum nuna stadio de l' internacia skribnormigo — oferante unuformecan grafismon. Cetere la kodo povas konsisti el skriboformoj internaciaj nur kiom jam tiaj ekzistas.

Certe, kiam progresas internacia skribnormigo, ĝi ankaŭ preparos pluan evoluigon de la kodo, kaj la internacian

Imperia Ekspozicio Skotlando 1938

Dum la ses monatoj majo ĝis oktobro Skotlando estos la hejmo de la plej grava Imperia Ekspozicio de post *Wembley*, kaj planoj estas jam faritaj por nin instrui kaj amuzi. Ĉar ĉi tio estas la unua fojo, kiam la hejmlando, reglandoj, kaj la kolonioj sin kunigas por fari elmontron al la mondo, la okuloj de la tuta mondo estos direktitaj al *Glasgovo*.

La industrioj, vivrimedoj kaj kulturo de la Imperio estas elmontrataj per cento da palacoj kaj pavilonoj, kiuj troviĝas en la ekspozicio, la *Parko Bellahouston*. Ĉiu reglando havos sian propran pavilonon. *Kanado*, *Aŭstralio*, *Novzelando*, *Sud-Afriko*, kaj *Irlando* prezentas sin grandskale. En la kvin pavilonoj duono de la riĉeco de la Imperio estos reprezentata.

Laŭlonge de la Aleo de Kolonioj troviĝos *Birmo*, la kolonioj de *Okcident-Afriko*, la kolonioj de *Orient-Afriko*, *Malajuo* kaj la ceteraj, kiuj alportas siajn produktojn al la ekspozicio de la kvar ekstremaj punktoj de la mondo. La hejmlando estos reprezentata, unue per la pavilono kiun la brita registaro nuntempe konstruas, kaj due per la komercaj elmontraĵoj en la *Palaco de Inĝenierado* kaj la *Palaco de Industrioj*.

Ĉiuj industriaj elmontraĵoj estos aranĝataj en grupoj tiel, ke en la *Palaco de Inĝenierado* troviĝos la plimulto el la pezaj maŝinoj kaj ilaro. En la *Palaco de Industrio* troviĝos, kontraŭe, reprezenta elmontrado de la multegaj industrioj kaj manfaritaĵoj de ĉiu nacio, lando kaj kolonio en la Brita Imperio.

Du pavilonoj reprezentos *Skotlandon*, la hejmon de la ekspozicio, kiuj mon-

planlingvon el tiu kodo eble estiĝontan. Al tiu ideoĉeno *Lendle* dediĉas specialan libroĉapitron: « *Ortografia reformado kaj problemoj de lingvo tutmonda* ».

Rimarkoj:

- 1) En la verko poste citita.
- 2) Eldonejo *Levin kaj Munksgaard*; 166 paĝoj.
- 3) Vidu la artikolojn: Pri la projekto de *ISAKodo*, « *Ekonomio ŝparanta* », 1936, p. 10/16; La nunaj terminoj internaciaj, « *Ekonomio ŝparanta* », 1933, p. 261-265.
- 4) E. *Wüster*: Internacia lingvonormigo en la tekniko, Berlino 1931, p. 289, piednoto 3. (Mallongigita eldono en *Esperanto*: « *Konturoj de la lingvonormigo en la tekniko* », *Wüster-Pfeffer*, *Literatura Mondo*, 1936.)

5) En *Aŭstrio* la kurso por la angla prononco estas preta (ne jam publikigita), bazanta sur principo de kromsignoj.

Rimarko de la redakcio de Esp. Int.: Koncerne la disvastiĝon de *Esperanto* kaj *Occidental* estas necese rimarki ke la disvastiĝo de *Esperanto* estas minimume 95 %, eble pli ol 99 %, de ĉiuj mondlingvaj projektoj kune, kaj ke inter la restantaj 1-5 % troviĝas, krom *Occidental*, ankoraŭ *Novial*, *Latino senfleksia*, *Ido* ktp. Ĉi tion ni rimarkas, por eviti falskompreneon ĉe komencantoj.

tros la evoluon de skota kulturo kaj industrio. La muroj de ambaŭ pavilonoj estos ilustritaj per grandaj muraj pentraĵoj, pentritaj de la pli juna skolo de skotaj pentristoj, kaj kulminos je okmetra statuo, simbolo de moderna Skotlando. Kaj multvalora kolekto da tapetoj montras scenojn el skota sporto tra la jarcentoj.

La *Palaco de Arto* enhavos ekzemplojn plej bonajn kaj indajn el brita arto. Troviĝos ankaŭ pentraĵoj de majstroj malnovaj kaj novaj, kelkaj montrataj al la publiko la unuan fojon kaj, en la *Pavilono de Virinoj*, specimenoj de la laboro kaj manfaritaĵoj senditaj de virin-organizo kies centoj da milionoj da membroj reprezentas ĉiun rason kaj angulon en la Brita Imperio.

La *Halo de Juneco*, *Teatro de Modoj*, *Altskotlanda Vilaĝo*, kun rivereto kaj lago, *Teatro Nekovrita*, kun sidloko por 3.000 personoj, meritas atenton, same kiel la pavilonoj de privataj firmoj kaj multaj pavilonoj dediĉitaj al individuaj intereso kaj agado. *Agrikulturo*, konstruado, transporto, minaĵo, gaso ktp., kosmetikoj, muzikiloj kaj ĉia ajn modernaĵo havos sian lokon en la ekspozicio. Por vin distri kaj amuzi la *Parko de Amuzoj* havas ĉiajn amuzilojn plej modernajn.

La ekspozicio estas konstruata ĉirkaŭ la *Turo de Imperio*, kiu estos 100 metrojn alta, kaj ĝia arĝenta kaj lumigata silueto estos videbla nokte je pli ol 80 mejloj. La turo estas bonega ekzemplero de moderna arkitekturo, kaj de ĝiaj galerioj, kiuj havos lokon por 200 personoj, estos videbla bela panoramo de montoj, lagoj kaj arbaroj, kaj inter la montoj kaj la ekspozicio fluas la rivero *Klajdo*, lulilo de la mondfamaj ŝipegoj « *Queen Mary* », « *H.M.S. Hood* », « *Empress of Britain* » ktp.

La sportejo *lbrox* troviĝas kelkajn centmetrojn for de la ekspoziciejo, kie vizitantoj povos vidi programon de sportoj, gimnastikoj kaj ĉian specon de atletaj elmontraj kaj paradoj. La sportejo *lbrox* havas lokon por pli ol 100.000 rigardantoj.

La ejo de la ekspozicio ne povus esti en pli taŭga loko ol *Glasgovo*, centro de la peza maŝinindustrio. La rivero *Klajdo*, kiu trafluas la urbon, estas la plej grava ŝipfarada rivero en *Granda Britujo*, eble en la tuta mondo. Oni vidas maŝinojn, ilarojn kaj modelojn de mondfamaj ŝipoj kiuj montras la kapablecon kaj lertecon de britaj inĝenieroj kaj ŝipkonstruantoj. Tiun ĉi jaron *Glasgovo* estos la centro de la Imperio.

Skotlando, lando de folkloro kaj romantiko, *Skotlando*, la bela, vin alvokas. Ne gravas, el kiu lando vi venas: kora bonvenigo vin atendas en *Skotlando*.

Iliaj reĝaj moŝtoj la *Reĝo kaj Reĝino* malfermos la ekspozicion la 3-an de majo 1938. T. C. Green.

De niaj korespondantoj

El Hungarujo :

Tri milionoj da pengoj donacitaj por hungaraj vilaĝoj.

La Esperanto-Gazetservo skribas el Budapest, ke la hungaraj ekonomiaj rondoj, fabrikindustrioj, bankoj kaj nacia banko kune prezentis tri milionojn da pengoj por helpi la solvon de la sociaj kaj higienaj problemoj de la vilaĝoj. Tia granda donaco ne estis ĝis nun donita en la postmilita Hungarujo por sociaj celoj. Ĝi montras la komprenon pri naciaj taskoj kaj laboroj. En la hungaraj vilaĝoj jam sukcese agadas la senditoj de la « Verda Kruco », nova movado, kiu edukas virinojn por poste prizorgi la sociajn aferojn de la vilaĝoj. La grandstila privata helpo ne estas tiom konata en multaj ŝtatoj, kiel en Anglujo kaj Ameriko, ĉar en multaj eŭropaj landoj precipe nur la ŝtato zorgis pri bonfaraj institutoj. Sed nun ĝojige ekiĝis la volo, kaj apud multaj ekleziaj fondaĵoj estas jam ankaŭ en Hungarujo privataj donacoj, kies ĝisnuna plej alta ŝtupo estas la komuna donaco de tri milionoj.

300 ekleziaj princoj, 200.000 adorantoj ĉe la tombo de Petro okaze la

Eŭkaristia Kongreso en Budapest.

Oni laboras entuziasme kaj vigle en la hungara ĉefurbo por prepari la kongresegon. Grandaj komitatoj zorgas pri la loĝigo, nutrigo, trafiko de la amaso. Oni konstruos, laŭ modelo de la tombo de Petro la Sankta en Romo, grandegan altaron sur la « Placo de Herooj », ĉe kiu 200.000 personoj trovos lokon por adori la eŭkaristion. Aparte partoprenos la junularo, skoltaro kaj sportistaro. Oni demonstracios kontraŭ la sendieco.

P. B.

El Norvegujo :

Bonega jaro por la Norvega Societo por Savo de ŝipperantoj (NSSR).

Por N.S.S.R. la jaro 1937 montras belan rekordon. Dum la jaro kvar novaj savŝipetoj pretiĝis por uzado. La kunaj kostoj estis n.kr. 300.000, aŭ preskaŭ 75.000 kronoj por ĉiu ŝipeto. La novaj ŝipetoj ĉiuj estas donacoj. Unu estas donacita de « Børsfondet » — la Borsa Fondaĵo, alia de la pogranda komercisto Alfred Larsen, la « granda, maljuna viro » de norvega velsporto, kiu en tiu ĉi maniero volas helpi tiujn kiuj velas sur la maro ne nur pro amuzo. La du lastajn ŝipetojn donacis la asekurkompanioj « Storebrand » kaj « Idun ».

La intereso por la laboro de la Sav-

societo estas tre granda. Eĉ en enlandaj distriktoj, kies kontakto kun la maro estas preskaŭ nenia, oni fondis klubojn kaj grupojn kiuj kolektas monon por novaj ŝipetoj, kiuj portos la nomojn de la donacintaj distriktoj. Kaj la Societo faras vere subtenindan laboron. Preskaŭ ĉiuj elspezoj estas pagataj per privataj donacoj. La ŝtato asignas nur malgrandan sumon ĉiujare. Ne mirinde, ke la malgranda, bone konebla ŝipeto ricevis la honoran nomon: La samaritano de la maro.

Norvega Internacia Gazetservo.

(Okaze de nacilingva represo, sendu ekzemplerojn al: Boks 353, Stabekk, Norvegujo.)

El Polujo :

Peltmantelo malsanigas belulinon. Kruele punita vanteco.

Tio okazis al belulino, loĝanta en la pola « Manchester », urbo Łódź, fama pro siaj teksejoj. Tiu fraŭlino posedas abundon da mono, kiun ŝia patro liveras al ŝi. Por ŝirmi siajn graciajn karnopecojn kontraŭ la kruela malvarmo vintra, ŝi sopiras kompletigi sian peltmantelan kolekton per nova akiraĵo — ekzotika felo, elorbitigonta la okulojn de envia amikina rondo. La « ŝlosilo de l' mondo » — mono — migras al... Persujo. Lertaj kontrabandistoj ekspedas la sopire deziratan harecan majstroverkon al ĝia destinloko.

Pave paradas nia Evo, tranĉe observata de la amikinaro, en sia persdevena peltmantelo. Nur mallonga tempo regas ŝia animleva stato. Iun tagon ulceroj kaj tuberoj kovras ŝian korpon. Tuja vojaĝo al Varsovio kaŭzas al la tieaj eminentaj dermatologoj grandan ekscitiĝon. Ili troviĝas renkonte al enigma haŭtmalsano, simila al terura — lepro, pene kuracebla.

Estonte verŝajne estiĝos preskribo, ke ĉiuj feloj, importitaj el foraj landoj, devos esti zorge desinfektataj.

Minuška Mantel.

El Svedlando :

De karbofajra sitelo ĝis radia navigado.

La unua sveda ŝipogvida lumilo konata datiĝas el 1202, sciigas interesa artikolo pri la evoluo de la sveda lumtura servo, aperinta en la Stokholma gazeto « Era », kiu estas organo por akceli racion uzon de elektro.

Estas longa paŝo de la primitiva karbofajro en sitelo, kiun oni en 1202, laŭ peto de la komercistoj en la Hansa-urbo Lübeck, elmetis por marki la rifon ĉe Falsterbo ĉe la sudsveda bordo, ĝis la elektraj lum- kaj radio-instalaĵoj de la

nunttempaj lumturoj kaj lumŝipoj. Jam dum multaj jaroj la navigistojn avertis pri tiu danĝera rifo lumturo kun elektra lumo, nebulsignalilo, aparatoj por radio-signaloj kaj signaloj submaraj.

Alia sveda borda lumilo estas tiu ĉe Kullen, ĉe la okcidenta bordo. Tiu datiĝas el 1560. De la pasinta jaro la lumturo de Kullen estas la plej forta en Svedujo kun 2,500,000 Hefner-unuoj.

Ĝis 1842 ekzistis nur 25 svedaj bordlumiloj, sed de tiam ili konsiderinde multiĝis. Laŭ la sveda bordo troviĝas nun ĉirkaŭ 1,600 lumturoj, el kiuj proks. 600 estas prizorgataj de la sveda ŝtato kaj la resto de havenaj aŭtoritatoj, privataj entreprenoj kun propraj havenoj, ktp. La ŝtataj lumturoj, kiuj servas la ĝeneralan martrafikon, konsistas el 75 grandaj lumturoj kun konstanta prizorgo kaj ĉirkaŭ 450 lumturoj sen prizorgantoj, 17 lumŝipoj kaj nombro da lumbuoj. La uzataj lumigsistemoj estas Aga-lumo, elektraj lampoj kaj petrolaj lampoj de diversaj specoj. La lastan fajrolumigilon oni forlasis en 1854, kaj rapoleon oni ne uzis post 1890. Ĝis nun estas elektrigitaj 56 el la svedaj lumturoj.

Navigohelpo per radio estas donata en Svedujo de tri radionavigaj stacioj ĉe la okcidenta bordo kaj de 13 radiosignaliloj, instalitaj en lumturoj kaj sur lumŝipoj, kiuj sendas specialajn signalojn. Dum la proksimaj jaroj oni konstruos pli da tiaj radionavigaj signalejoj. Sinkronaj radiosignaloj kaj submaraj signaloj estas sendataj de kvar lumstacioj, kaj tiuj signaloj ebligas al ŝipoj ekipitaj per necesaj riceviloj determini sian distancon de la lumturoj aŭ lumŝipoj, kiuj sendas la signalojn.

Sved-Internacia Gazetservo.

F. Marja H. de Vernyj:

Oj Jovan*

Remisto mia blonda
ĝis post Jablanac naĝu
kantu al mi la serban kanton
Oj Jovan
eksilentu kaj ne amu

Se vi min kisos sur lipojn
Oj Jovan
ne preterpasos vin kordoloro
mi ne apartenas plu ol homo
Oj Jovan
mi estas amatino de maro

Ne ĉirkaŭprenu min eĉ per okuloj
Oj Jovan
vi ĉirkaŭbrakas krucon
mi estas odalisko de maro
kaj vi pekos
per sakrilegio
Oj Jovan

El la libro « Kanto de odalisko de maro por reĝino Marija ».

Propra traduko de la aŭtorino el la ĉeĥa lingvo.

*) La aŭtorino ne uzas interpunkcion.

Estonta milito

Post nelonga tempo pasos 2000 jaroj, de kiam sur la insulo Patmos en Egea Maro la Sankta Johano skribis sian misterplenan libron « Apokalipso » (lasta libro de la Biblio). Ankoraŭ en la malfrua mezepoko ĝiaj vizioj pri ĉiondestruanta militistaro de Antikristo teruradis la homojn. Sed nuntempe la nigrajn viziojn de tiu libro multe superis la publikaĵo « What would be the character of a new War » (Kia estos la nova milito), aperinta en Londono, en kiu dek-ok militfakuloj el Eŭropo, Ameriko kaj Japanujo priskribas, kiel aspektus la venonta milito. Ĝi estas des pli terura, ĉar tio ne estas sole fantaziaĵoj, sed spertoj, apogantaj sin je la kono de ĉiuj diablaj eblaĵoj de la moderna militscienco.

Generalo Fuller skribas, ke per revoluciigo de la produkta tekniko ŝanĝiĝis ankaŭ la militmetodoj. Kiel en la industrio per raciigo estas flankenigita la laboristaro, tiel en la militfako per mekanikigo la infanterio. Ankaŭ la kavalerio ne povos mezuri siajn fortojn kun motorprovizitaj taĉmentoj, kiuj decidus. La 24-an de aprilo 1918 sep britaj tankoj kun 21-vira garnizono devigis tri germanajn batalionojn sin retiri kaj mortigis 400 virojn. La tankoj kontraŭ la infanterio — tio ne estas milito, skribas la citita fakulo, tio estas buĉado. Kunligo de la infanterio kun tankoj estas sen-senca pro ilia diversa movebleco. Same la kazerna edukado estas malsaĝaĵo, nuntempe estas grava la edukado de teknikaj specialistoj en fabrikoj kaj garaĝoj.

Laŭ opinio de angla majoro Bratt, la rezulto de la estonta milito decidiĝos en aero. La fervojo perdos sian signifon pro motorprovizo de taĉmentoj. La atakoj de aviadiloj, kontraŭ kiuj kiel ajn ekipita artilerio estas sendefenda, ne estos direktitaj kontraŭ fortikaĵoj kaj fervojnodoj, sed kontraŭ fabrikoj, muelejoj kaj minejoj. La soldataroj ne mortigados unu la alian, sed la loĝantaron.

Ankaŭ la kemia milito estos laŭ la svislanda kemiistino, D-rino Gertrude Waker, multe pli terura ol en la pasinteco. Nuntempe ekzistas bomboj, kiuj, tuŝinte domtegmonton, atingas ardon de 3000 gradoj, ilia ŝtala ŝelo disfaŝiĝas, la brulanta enhavo ŝprucas ĉirkaŭen kaj fluas de unu etaĝo al la alia. Aliaj pli pezaj bomboj penetras profunden en la teron, formante tie fajrujojn, kiuj ĉirkaŭe vastigas flamojn. Ĉi tiuj bomboj estas precipe destinitaj por akvo- kaj gas-tubaroj, kies eksplodo pligrandigos ankoraŭ ilian detruforton. Nova ilia tipo estas bomboj, kiuj pereigos ĉirkaŭe en distanco de 800-1000 metroj ĉion vivantan.

Generalo Growes argumentas, ke ne estas eble ŝirmi grandurbojn kontraŭ la

Kiel moderna Robinsono en la argentina praarbaro

Tre longa estas la vojo, kiun la gazeto devas trapasi por atingi min. En knaranta vagonaro ĝi preterpasas la svisan limon kaj vojaĝas al la maro. Tri semajnojn ĝi estas sur la maro, kaj kiam ĝi fine post nova tutsemajna vojaĝo atingas la mondforgesitan terpecon Misiones, pasis precize unu monato de post ĝia apero.

Se mi tiam sidas antaŭ mia el bambuo kaj pajlo konstruita kabano en la praarbaro kaj atente legas ĝin, tiam ĝi ne estas malaktuala. Por mi ĝi ja entenas la plej novajn komunikojn. Ofte mi prenas la gazeton kaj sidiĝas sur ŝtono ĉe la rivero. Mi legas kun tiu sento de komforto kaj trankvilo, kiu ŝajne primokas ĉiun tempopason. Multaj artikoloj faras strangan impreson. Jam tro multe mi foriĝis el la civilizita vivo, kaj la granda trankvilo, kiu tage kaj nokte ĉirkaŭas min, jam funde enpenetris en min. Aliaj tamen incitas min. Mi fariĝas maltrankvila, batalema. Sento, kvazaŭ mi devus kurataki, ekregas min. La pulsanta vivo min ignoras, kaj mi dezirus partopreni, kapti la kanajlon de l' furioza militismo por ĝin ekstermi. Rapide mi forlasas la riveron kaj reiras al la kabano. En tiuj momentoj mi sentas ardan bezonon je konversacio kaj societo. Tiam mi eksidas antaŭ la maŝino kaj skribas, skribas, ĝis kiam krepusko kaj dormemo haltigas ĉiun laboron. Sed la tagon poste — kiam brila suno ore lumigas la larĝan riveron kaj ĝiaj unuaj radioj tuŝas la kabanon —, mi prenas la fosilon kaj hakilon por prizorgi mian

aviadiloj, kiuj en mallonga tempo ŝanĝos tutajn stratojn en flamomaron. Forkuri en kelojn kaj subterajn tunelojn estos sencele. Britaj aeroplanoj estas nun kolorŝmiritaj tiel, ke ili estas praktike nevideblaj. Ĉe noktaj manovroj en Londono estis per fortaj reflektoroj sole 16 el 250 trovitaj, kvankam ili flugadis malalte super la tero.

Granda « progreso » okazis en gasfabrikado. Ĉe multaj oni ekkonscias pri ilia efiko, kiam estas jam malfrue. « Verda » gaso kaŭzas t.n. « sekan » dronigon. Per ĝia efikado la pulmo ensorbas la akvon el la sango, sekve de kio ĝi tutepleniĝas kaj oni dronas per propra sango.

Brita majoro Lefebvre mencias pri senutileco de la gasmaskoj. Ekzistas multaj gasoj penetrantaj ilin. Franca profesoro Langevin asertas, ke cent modernaj aviadiloj kapablas detru tiom grandan urbon kiom estas trimiliona Parizo.

El la ĉeĥa ĵurnalo « Právo Lidu » trad. *Stanislav Borovka*.

grundon. Semeron post semero mi metas en la ruĝan teron, kaj ĉiuj problemoj, kiuj boligis mian internon la tagon antaŭe, nun tute malaperas. Mi revenas al mia natura vivo. Ofte en tia stato mi pensas pri miaj amikoj aliflanke de la oceano kaj deziras ke ili estu ĉi tie por konatiĝi kun mia vivo. Malĝoje mi tiam pensas pri la momento, en kiu mi devne forlasos la malgrandan kabanon, la altan arbaron kaj la karan riveron.

Hejme en la lernejoj oni parolis al ni multe pri libereco, kaj ĉiujare en aŭgusto la fajroj ekflamas sur la svisaj montoj kiel signo de la libereco. Pli ol jaron mi nun vivis ĉi tie, kaj nur hodiaŭ mi komprenas kio estas libero. Malproksime, en forgesita angulo de fremda lando kien ĝis nun ankoraŭ ne penetris la civilizo, mi trovis ĝin. Kun nia arkaika ekonomia sistemo ni foriĝis de ĉia natura vivo kaj ree ni fariĝis sklavoj. Sklavoj de la laboro, sklavoj de la mono, sklavoj de la socio. Kompreneble en la pli dense loĝataj regionoj de Argentino estas same. Nur se oni penetras norden en la subtropikan klimaton, kie 80 % de tre fekunda tero estas ankoraŭ tute netuŝita de homoj, tie oni atingas plenan sendependan vivon. Certe la unua tempo estas malfacila, ĉar ni ja ne plu kutimas plene memstaran vivon. Sed la zorgoj baldaŭ malaperas. La grundo per multe da laboro produktas multe pli ol oni bezonas por si mem. Bestoj abundas en la arbaro, kaj la rivero estas riĉa je fiŝoj. Baldaŭ oni ĝuas ĝis tiam nekonatan trankvilon kaj kontenton. Estas kvazaŭ oni staras en la lernejo de l' vivo, kaj mi sentas ke la nova vivo reformas min al homo. Hodiaŭ mia nova estado tiom pleniĝas min ke mi amare rememoras mian antaŭan vivon plenan je devoj kaj dekretoj: multspecajn impostojn kiaj: komunumaj, ŝtataj, militdefendaj, malsanasekura, fajrobrigadaj kaj multaj aliaj. Mi venis ĉi tien, elektis belan lokon kaj starigis mian kabanon. Sur taŭga peco da grundo mi komencis semi, kaj tie, kie la rivero en granda kurbo malrapide fluas, mi fiksas longan draton por fiŝkapti. Neniu demandis pri mia alveno, neniu okupos sin pri mia foriro. Se mi per kanoto krozas la riveron kaj albordiĝas aliflanke, mi metas la piedon sur fremdan landon — Paragvajo. Sed mi ne bezonas pasporton, kaj neniu bonvenigas min per fusilkugloj. Mi vivas en la bela iluzio ke la landlimoj estas malaperintaj de la tero. Ĉiu racia homo scias ke neniam la celo de homara evoluo estas la reiro al primitiveco. Se oni tamen por kelka tempo povas rifuĝi el la freneza socio, tiam oni volonte kontentiĝas per simpla vivo kun ĝiaj malfaciloj kaj danĝeroj, kaj oni dankas la terpatrinon pro la trovita angulo, kien la nuntempa « ordo » ankoraŭ ne penetris.

S. Bernhard (trad. Fiziokrato).

Ĉe vilaĝa razisto

De Carl Franzmann, Groesbeek

Agrablan interrompon de la ĉiam sama unu-toneco de nia vilaĝeto havigas al mi oftfoja vizito al nia tre babilema, simpatia razisto.

Li estas dikventra viro; lia ŝajne sensignifa babilado efikas al miaj oreloj tre ofte kiel kvietiga muziko.

Bone nutritajn personojn — laŭ mi — ĉiam ĉirkaŭŝvebas io grava, io nedifineble serena. Ofte mi jam pensis ĉi tio, kial dikventraj viroj ĝenerale elradias tian serenecon, tian — kiel ni diru? — imponan aŭtoritaton. Estas fakto, la nura vido de iu pufvanga vizaĝo sufiĉas, ke mi tuj sentas certan respekton antaŭ la koncerna persono. Eble tio estas nura ludo de mia freneze vigla imagpovo; povas ankaŭ esti, ke mia propra sensignifeco rilate al korpaj proporcioj timigas min, ĉar mi estas malgrasa vir-eto, forlovebla per ĉiu vento.

Frumatene mi denove estis ĉe nia razisto.

Sidante en la komforta seĝo, mi obvervis kun ĝojo la diversajn preparadojn necesajn por la « grava » operacio. Ĉu la ĉiutaga plibeligado de la mentono envere estas grava operacio? Ne, tute ne. Se mi lasus kaprice kreski mian barbon, certe tio estus same bona, ĉar ĉi tie — primitivuloj ni ja estas — ĝenerala kutimo estas, ke oni nur unfoje en la semajno plibeligas sian vizaĝon.

Do mi submetiĝas al la lertaj manoj de la razisto nur pro tio, ke mi povas forbabiladi la frumatenaĵojn ĉe la mastro laŭ amuza maniero.

Jes, kara leganto, tia feliĉangulo ankoraŭ ekzistas en ĉi tiu mizerplena mondo, kie oni ne havas aliajn zorgojn. Ni primitivuloj argumentas proksimume tiel: Kio estas zorgoj? La vorto zorgo enhavas ideon pri manko de la ĉiutaga pano en la ŝranko, pri nesciado, kiel travivi la morgaŭan tagon. Sed ni ne ŝatas tian cerbumadon, ĉar karakteriza simptomo por nia pensmaniero estas, ke niaj pensoj prefere ne transpaŝas la malvastan cirklon de nia hejma distrikto. Ĉu malbone? Mi ne scias. Ĉiukaze la verkinto de ĉi tiu babilado ja ne estas kulpa pri tio, ke longjara malaktiveco preme ŝarĝas liajn ŝultrojn, ke mistera sorto volis lian nunan neokupitecon.

Do akceptu ĉi tiun senkulpigon pro diraĵo mia, ke simpla plibeligado de vira mentono por ni vilaĝanoj estas grava afero.

Ho! estas ĉarme vidi la mastron ĉe la laboro!

Vidu la viglajn gestojn! Je la diablo, kiel estas eble, ke li povas teni per la maldekstra mano tiel lerte la porcelanan sapujon, dum li samtempe per la dekstra mano ekfunkciigas la razpeniketon, por taŭge ŝaŭmigi la bonodoran sapon?

Ne daŭros longe, kaj ankaŭ la lango de l' mastro ekfunkcios, ĉar tre mirige estas, ke li dum la sinseko de la unuopaj ceremonioj ĉiam aplikadas la saman metodon. Jen la procedo: unue li glatigas per akra substanco la haŭton; ĉe tio li ankoraŭ bremsas sian babilemon. Pli poste, kiam li majstre ensapigas la mentonon, li ankoraŭ — silentas. Finiĝas la pantomimo, kiam la bone akriĝinta razilo ektuŝas la haŭton de la kliento. Tiam ekestas la momento, ke li malfermas la buŝon, por belparole pribabiladi la plej novajn okazintaĵojn.

Kaj ĉi tiu momento estas vera miraklo. Subite li superŝutas la klienton per agrablaj frazoj. Tio efikas kiel akvo, falanta de iu alta krutaĵo.

Ankaŭ hodiaŭ en la frumateno estis tiel. Jam forpasis la senvortaj momentoj de l' ĉiutaga komedio. Alvenis la solena, ke li komencis paroli jene:

— Hodiaŭ iu estas razita lastfoje per mia mano!

— Hm! — mi penis flustri pro la proksimeco de la razilo ĉe mia vizaĝo. Hm! ĉu vi diris:

lastfoje? Kial lastfoje? Ĉu iu mortis en la vilaĝo?

— Jes, iu mortis, li kun tomba voĉo respondis.

— Kiun aĝon li havis?

— 48-jara kampulo li estis. Antaŭ kelkaj tagoj li ankoraŭ marŝis malantaŭ sia plugilo. Hieraŭ vespere lia vividno komisiis al mi, ke mi venu por la lastfoja razado.

Ekestis paŭzeto — kaj dume la razado ne haltis. Parte la blanka ŝaŭmaĵo jam malaperis de mia mentono. Tre impresite de la funebra novaĵo, mi ne riskis diri eĉ unu vorton. Inter-tempe nia bona mastro prenis flakoneton de la murbreto. Guton da bonodora oleo li dis-premis sur la manplato, kaj la frodato per la olehava mano bonege efikis al la streĉita haŭto. Finiĝis la operacio en ĉirkaŭ de la mentono.

Sekvis la hartondado. « Nur iomete plimal-longigu la kapharojn, mi petas! » Kaj mildmuĝe eksonas la motoreto ĉe miaj oreloj. Kaj ankaŭ ĉi tiun laboron akompanas pluaj klarigaj vortoj rilate al la ĵus mortinta kampulo. Por diri ion, mi esprimis mian miron pri tio, ke razisto ŝajne ne estas timema viro. Brrrr! eniri la domon de mortinto kaj prizorgadi tie la lastfojan razadon! — Brrrr! tio ne estas ĉiutaga afero!

Ridis la mastro kaj diris:

— Ho! tio ne estas grava. Fariĝas jam baldaŭ kutimo. Estas ja la sama kiel ĉe pastroj, kuracistoj kaj flegistinoj. Oni alkitimigas al la profesio. Ĉe tio razisto eĉ okupas honoran pozicion, ĉar li estas la unua persono, kiun oni venigas, por ke la mortinto ekhavu bonan aspekton por la pli poste alvenontoj.

Mi nur grumblis: « Strange, strangege! »

Samtempe mi ekfunkciigis mian pensaparaton. Boris en mia cerbo deko da « Kial? Kial? » Ne por la unua fojo mi ja spertis, ke simpluloj ŝatas paroladi pri mortintoj kaj enterigoj. Kial? Kial? Ili priparolas ĝenerale tiajn aferojn, kvazaŭ temus pri la plej simplaj aĵoj de la vivo. Ĉar mi ne estas denaska kampulo, nature ĝenis min la ege malgaja konversacio. Mi montris aĉan grimacon, sed la mastro en ĉi tiu momento ne povis vidi mian vizaĝon, ĉar ĵus li estis lavanta la kapon. Pleniginte la versujon per akvo, la bona mastro prilaboris dum mallonga tempo mian kapon laŭ konata maniero. Kaj, feliĉe, la refreŝiga bano forpelis per unu bato la malgajajn ideojn el mia kapo.

Fulmotondro! altranĉis denove la mastro ĉi tiun malbenitan temon. Jen li finpunktis la babiladon per vortoj el la Biblio:

— Mallonga estas la daŭro de la vivo. Kiel floro de kampo pasas super ĝi vento kaj ĝi jam ne ekzistas...

Brrrr! razisto mia, vi ĝis nun ja estis tre simpatia al mi, — sed permesu, tian predikadon dum razado mi konsideras nekonvena. Sincere dirite, mia abomeno devenis ĉefe de tio, ke mi ĉiam pensadis pri la razilo, certa ankaŭ uzita dum la funebra razado.

Malgraŭ ĉio — mi estas stultulo! Kial laciĝi min per aferoj, kiuj per si mem estas ordaj? Povas esti, ke mi malbone dormis dum la lasta nokto; eble mi tro longe ŝvitis super libroj kaj problemoj, kiuj estas tute fremdaj al la ĉi-tieaj homoj. Mi ja ne povas priparoli kun ili pli gajajn aferojn ol morton, enterigon ktp. Ili komprenas nenion pri tio, kio larĝigas la spirantan horizonton. Krome ne estas neverŝajne, ke aparta instinkto avertas la vilaĝanojn, ke ofta meditado pri la mallongeco de la surtera vivo donas kelkfoje novajn fortojn al la laciĝinta animo.

Sed ni revenu al la razilo. Bone pripensite, estas ja memkompreneble, ke oni uzas la koncernan instrumenton nur por tiaj celoj. Estus ja ĉielenkrianta skandalo, se la kontraŭo estus vera!

Por forigi la malagrablajn pensojn, por direkti ankaŭ la ideojn de la mastro sur tute aliajn vojojn, mi diris:

— Kaj kiel status via razejo? Ĉu vi havas sufiĉe da klientoj?

Respondis la mastro:

— Tutkore mi dankas pro la afabla demando. Certagrade mi ne rajtas plendi pro krizo. Post kiam la modo ordonis al la virinoj tute novajn frizaĵojn, mia butiketo ne plu estas sen klientoj. Speciale en la prepara tago por la dimanĉo; decas, ke la junularo lasu sin plibeligi. La irado al la preĝejo postulas bonan frizaĵon. Lastdimanĉe la pastro dum predikado diris, ke la diablo ĝuste elserĉis la modon, por trompligi for de la ĝusta vojo la vantajn virinojn. Mi memorfiksis lian averton. Laŭvorte ĝi tekstis jene: « Ĉu modo? Kio estas modo? Modo estas eltrovaĵo de la diablo, nur taŭga, por forigi la dolĉan pacon el la animoj de simpluloj. Hejme la infanoj suferas pro malsato, hejme ne estas pano en la ŝranko, kaj samtempe oni povas konstati, ke niaj parofaninoj kiel reĝinoj vestitaj forlasas siajn domojn. Vere, vere, pli bone estus, se ili prizorgus la bonan mastrumadon de la hejmo ol ĉiam pensadi pri vestaĵoj kaj modaj vantaĵoj! »

— Haltu! karulo! — mi diris. Jen denove vi ektuŝas interesan temon.

Estas vero, ankaŭ mi jam oftege dum dimanĉa mateno mirokuladis la preĝejon irantajn virinojn. Kaj — vere, mi mensogus, se mi dirus, ke la bildo ne ĝojigus min! Kiam ili preterpaŝas — en longa procesio —, la tuta strateto antaŭ nia domo odoras je bona sapo. Vole-nevole mi devas pensi pri tio, ke ili nur unufoje en la semajno ĝuas purigan banon. Tute proksime estas la pensado pri freŝe lavitaj tolaĵoj, pri zorge faritaj frizaĵoj, pri — nu, pri ĉio ebla, kio apartenas al la kulturo de la korpo. Ĉu tio estas malbona? Antaŭ nelonge la tajloro asertis: « Estas vera beno, ke la kampuloj ne

Rido sanigas

Telefona interkomuniko estas malbona.

Ĉe gesinjoroj Schmidt sonoras la telefono. S-ro Schmidt deprenas la aŭdilon.

« Hallo, Erwin, ĉu estas vi? » — « Jes, ĉi tie estas Erwin Schmidt! »

« Aŭdu, mia kara, momente mi stas malbone; ĉu vi ne povas pruntedoni al mi 50 markojn? » — « Mi ne komprenas; mi petas, ripetu! »

« Mi — bezonas — urĝe — iom da mono! Ĉu vi povas — pruntedoni al mi — 50 markojn? » — « Pardonu, mi ne komprenas eĉ unu vorton. »

La alia denove ripetas. Klare venas lia voĉo. « Ha! » ekkrias Schmidt, « strange, mi tute ne komprenas vin. »

Nun sin emiksis la oficejo: « Sed mi petas, diras fraŭlina voĉo, « la komunikiĝo estas bonega, mi tre bone komprenas la alvokinton. »

« Ĉu vere? » diras Schmidt. « Nu, pruntedonu do vi al li la 50 markojn! »

Letero al « La Sinjoro ».

Maljuna negro transdonis leteron al sia preĝisto. Ĝi estis adresita al « La Sinjoro ». La maljuna negro skribis ke li preskaŭ estas perdonta sian hejmon pro neebleco pagi la rentumon de la hipotekoj; ankaŭ ke li estas sen nutraĵo kaj malsatas. Li petas « La Sinjoron » pruntedoni al li 50 dolarojn.

La preĝisto, sentante kompaton por la maljunulo, kolektis 42 dolarojn inter siaj amikoj kaj donis tion al la maljuna negro.

Post semajno la preĝisto ricevis alian leteron, ankaŭ adresitan al « La Sinjoro », kun jena enhavo: « Kara Sinjoro Moŝto: Mi petis ke vi pruntedonu al mi 50 dolarojn, sed la preĝisto donis al mi nur 42 dolarojn. Estonte bonvolu fari negocojn rekte kun mi! »

Nun li sentas sin hejme.

« Kio? Vi nepre fraŭlego tamen edziĝis? »

« Jes, vidu: estante fraŭlo, mi sentis min hejme nek dome nek eksterdome; nun almenaŭ eksterdome mi sentas min hejme! »

ankaŭ fariĝis ŝparemuloj. Dank' al Dio, ili ne tenas la dikfingron sur la monujo. Estas vera feliĉo, ke ili malavare elspezas la ofte kun granda penado akiritan monon. Alikaze ni ja povus fermi la pordojn de niaj butikoj.»

Tio estas pruvo, ke ĉiu afero plejofte posedas du malsamajn flankojn. La honorinda pastro en certa rilato estas prava, asertante, ke modo estas danĝera tento de la virina animo; sed, laŭ mi, ankaŭ la tajloro pravas, kiam li substrekas la utilecon de senzorga monforĵetado. Mi diris tion al la mastro, kaj ĉu vi povas diveni, kion li respondis? Li diris:

— Jes, sinjoro, ankaŭ vi estas prava. Do ni ĉiuj estas pravaj!

— Hola! mi pensis. Ĉu estas eble, kurbigi la veron tiamaniere, ke oni rajtas aserti: ĉiuj estas pravaj?! Ne, tio ne estas ebla. Mia opinio ekzistas nur unu vero. Kaj por eltrovi la ĝustan veron, jam multaj homoj laciĝis.

La frumatena vizito al la razejo instruis min. Ju pli longe mi pripensas la problemon, des pli klare mi ekkonas: la t.n. paco de la vilaĝa kunvivado envere estas ege suspektinda afero. Kelkfoje ĉi tiu « paco » eĉ iomete naŭzas min.

Antaŭ ne tro fora tempo mi kiel naivulo pensis, ke homa rondeto sen konfliktoj kaj disputoj povus ekzisti, ĝis kiam mi en la praktiko spertis, ke tio fine kondukas al griza inerteco. Feliĉe, nia kunvilaĝanoj ne konscias pri tio. Sufiĉas al ili la eterna babilado pri morto, enterigo ktp., kvazaŭ la bela vivo estus nenio alia ol funebra irado al tombejo. Antaŭ nelonge ankaŭ mi opiniis, ke la kompleta forestado de ĉiuspeca rezonado estas avantaĝo; sed nun eta bedaŭro ŝteleniras mian koron, kiam mi pripensas la sorton de aliaj homfratoj...

Per aluno-bastoneto nun la mastro forigas la lastajn sangopostsignojn. Tutkore li ridas, kiam mi diras:

— Jes, mastro, ĉiuj estas pravaj!

Post mia reveno hejmen, restis la malsereneco en mia animo. La ĉarmo de nia vilaĝeto ja konsistas en tio, ke la simpla vivmaniero malhelpas ĉe ni la kreadon de t.n. problemoj. Jes, problemoj eĉ tie ne ekzistas, nur enuo kelkfoje videbligas...

Senliman ferion oni ĉi tie donas al la homa pensaparato. Amuzas min, ke tia vivo estas ebla. Tamen, ĝi nur estas ebla pro la mistera

fonto, troviĝanta ie en la profundo de la popola animo. Temas pri la fonto de la — mistiko, el kiu trinkas la simpluloj dum multe, multe da generacioj.

Kaj la rezulto? Kiam oni parolas ekzemple pri politiko, nura ŝultrolevo estas la respondo. Kaj kiu emas nudan logikon, tiu tuj samopinias kun mi, ke niaj vilaĝanoj estas veraj pacifistoj, ĉar ankaŭ sincera pacifismo kondukas al plena inerteco, almenaŭ tiom longe, kiom ne aliĝas la nuna mondo.

Iam mi legis belegan artikolon de samideano Lanti pri « Raciigado ». Jes, estus granda feliĉo, se la orajn vortojn pri « racio » oni povus ankaŭ atingebligi al simplaj vilaĝanoj. Sed imagu la kolosan laboron necesan, por ekzemple komprenigi al nia kara mastro en la razejo la signifon de diversaj nuancoj inter mistiko kaj racio!

Oni ja bezonus almenaŭ tri jarcentojn, por faradi tian laboregon! Kaj pro tio estas hodiaŭ mia kordeziro, esprimi profundan respekton antaŭ la jam farita laboro de niaj pioniroj.

Tra indiferenteco kaj mallumo ili kondukas nin al glora celo...

LA ESPERANTISTA REKLAMO

La prezo de anoncetoj

estas egalvaloro de 10 belgaj frankoj aŭ 0.60 ned. guldenon, por la unuaj 20 vortoj aŭ mallongigoj; por ĉiuj pliaj 10 vortoj komencitaj 5 belgaj frankoj aŭ 0.30 guldeno. La anoncetoj aperas en la semajna kaj (laŭ la disponebla loko) monata organoj de Internacia Esperanto-Ligo, nome en « Heroldo de Esperanto » kaj « Esperanto Internacia ». Por mendi anoncetojn, oni turnu sin al la Administracio de **Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando; nederlanda poŝtĝiro 1306.30 ('s-Gravenhage); belga poŝtĝiro 2044.04 (Bruxelles).**

Fianĉigo. La 17.4. gefianĉiĝos f-ino Camille Sananés kaj s-ro Kalph Abitbol, fakdelegito de IEL en **Casablanca**, Maroko. — Nian plej koran gratulon!

Nekatolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolikismo, senpage povas ricevi ilin de la Internacia Katolika Informejo: **Fraterhuis, Vliert, 's-Hertogenbosch, Nederlando.** (493)

Du junaj finnaj fraŭlinoj volas korespondi kun ĉiulandaj esperantistoj. **Suomi, Helsinki**, Irma Blom, Merimiehenk.21.A., kaj Irene Sironen, Albertink.46.C.

Esperanto-filatelio. Serĉas Esperanto-Kongresstampojn Praha 1921, Antwerpen 1928, Budapest 1929, kaj aliajn: **Anderegg-Chevalley, Horn** (Thurg.), Svislando. (Urĝa.)

Korespondi deziras 16-jara hungara junulo kun ĉiulandaj junuloj. Adreso: Francisko J. Kiss, Erzsébet-királyné u. 49, **Monor**, Hungarujo.

Filatelisto el Flandrujo deziras ŝanĝi poŝtmarkojn kun alilandaj filatelistoj. Adreso: Franz Luyten, Bergstraat 93, **Heist op den Berg**, Belgujo.

Fraŭlino 20-jara ŝtatas ricevi multajn poŝtmarkojn kaj leterojn el ĉiuj landoj. Mi certe respondos. **Marguerite Verraedt**, Bergstraat 47, **Heist op den Berg**, Belgujo.

S-ino Lisikova Viveja, ul. Sredne-Moskovskaja 90, **Voronejo**, U.S.S.R., volas korespondi kaj interŝanĝi je Esperantaj libroj, legolibroj, gazetoj, poŝtkartoj kaj poŝtmarkoj kun ĉiuj landoj. Certa respondo.

12 anoj de la studklubo de « Norda Grupo » deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Respondo garantias **H. Smits**, Zaagmolenstraat 193, **Rotterdam**, Nederlando.

Deziras korespondi kun Svislando, Danujo, Svedujo, Norvegujo, Amerikoj pri literaturo precipe pri laktaj produktoj. — **N. Bissot**, Velodrome, **Ensival**, Belgujo.

Laboristo de fabriko, 23-jara, deziras tutmondan korespondadon kun samideanoj pri diversaj temoj. S-ro Bertil Svensson, Kronofors, **Fröseke**, Svedlando.

Mi deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kun samideanoj el ĉiuj landoj. Respondo garantiata. Skribu al s-ro Bror Svensson, Kirsebergsgat. 6, **Malmö**, Svedio.

Sendu al mi kvindek poŝtmarkojn de via lando, kaj mi sendos al vi je parolo de honoro kvindek poŝtmarkojn de Nederlando kaj de Nederlanda Orienta Hindujo. — **J. Muus**, Merelstraat 31, **Leiden**, Nederlando.

S-ro Takio Tezuka, biologo, ĉe Asamaŝi Marbiologia Laboratorio, **Asamuŝi**, Aomori-ken, Japanujo, deziras korespondi kun biologoj en ĉiuj landoj.

Esperantan poŝtkarton eldonitan de ĉeĥoslovaka poŝtministerio kaj prospektojn pri Ĉeĥoslovakio vi ricevos por unu internacia respondokupono de: Esperantista Klubo, **L. Bělohrad**, Ĉeĥoslovakio. (499)

16-jara sveda knabo deziras korespondi kun samaĝaj knaboj kaj knabinoj en la tuta mondo. Certe respondos. Åke Karlsson, Venavägen 19, **Örebro**, Svedlando.

Miaj 32 gelnantoj, komencantoj kaj progresintoj, 14- ĝis 40-jaraj, deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Skribu multnombre al Esperanto-instruisto **A.B. Østensen**, **Folldal**, Norvegujo. Respondo garantiata.

Facila stilo, interesa esprimmaniero estas trovata en la (bedaŭrinde tro malmulte legata) originala Esperanto-romano de **R. Meyer**: «La longa vojo». Prezo (inkl. sendkostoj) nur guld. 1.20, de la eldonejo: **Heroldo de Esperanto, Scheveningen, Nederlando.** (481)

Filatelistoj! Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun samideanoj el ĉiuj landoj. — Adreso: S-ro Taro Nishida, c/o Miyazaki, Ebisugawa-Sakaimachi, **Kioto**, Japanujo.

Senpage publikigas adresojn de **geknaboj**, kiuj deziras korespondi, la monata infangazeto « La Vojo ». Adreso Redakcio: **Marathonweg 15, II., Amsterdam**, Nederlando. (453)

Poŝtmarkojn interŝanĝas grandkvante aŭ laŭ katalogvaloro (prefere Michel) s-ro **A. Hvorslev**, Asylvej 1, **Riisskov**, Danujo. (Estrarmembro de Jutlanda Filatela Klubo.)

Kristanaj esperantistoj! 50 komencantoj en Esperanto deziras korespondadi kun samideanoj tutmondaj. Skribu baldaŭ al: Kristliga Folkhögskolan, **Jönköping**, Svedlando. (500)

Interŝanĝas fotografajojn el la tuta mondo: **S. Wakamatsu**, 22 Tcyosumi-cho, Shitaya-ku, **Tokio**, Japanujo.

20-jara finna fraŭlino volas korespondi kun ĉiulandaj esperantistoj. **Saima Heinonen**, Oikokatu 5.9., **Helsinki**, Finnlando.

Itala samideano interŝanĝas poŝtmarkojn kaj glumarkojn kun la tuta mondo. Respondo certa. **Giovanni Della Savia**, Via della Valle, 12, **Udine**, Italujo.

BELLAMY

estas tiu famulo kiu verkis la libron

Rigardante malantaŭen en la jaro 2000

Ĝi interesis jam centmilojn en diversaj naciaj lingvoj, ĝi interesos ankaŭ vin en la lingvo internacia.

Prezo (inkl. sendkostoj) por la broŝurita eldono guld. 1.65, por la bindita 2.50.

Heroldo de Esperanto, Scheveningen (485)

VIZITU SOUTHEND-ON-SEA

MARBORDEJO PLEJ PROKSIMA AL LONDONO.

FAMA PRO SIAJ BELAJ KRUTAĴOJ, PUBLIKAJ ĜARDENOJ, KAJ VIGLIGA AERO.

ABUNDAJ AMUZOJ KAJ SPORTOJ. MILITISTAJ MUZIKISTAROJ, KONCERTOJ, TENISO, GOLFO, NAĜADO. — FAMA MARPONTO.

KARNAVALA SEMAJNO, AŬGUSTO 13-20. — ILUMINADO DE KRUTAĴOJ, MARPONTO KAJ MARBORDO DUM SEPTEMBRO KAJ OKTOBRO.

OFTAJ VAGONAROJ DE LONDONO, DE FENCHURCH STREET KAJ ST. PANCRAS (L.M.S.), LIVERPOOL STREET (L.N.E.R.) KAJ METROPOLAJ SUBTERAJ FERVOJOJ.

KOMFORTAJ HOTELOJ KAJ PENSIONOJ.

POR INFORMOJ SKRIBU AL CORPORATION INQUIRY BUREAU, PIER HILL (52), SOUTHEND-ON-SEA, ANGLUJO.

(476)

Al vojaĝemaj esperantistoj! Petu detalojn pri la 12-a Hungarlanda Esperanto-Kongreso, 4-6.6.1938 okazonta en bela urbo Pécs (post la Eŭkaristia Kongreso en Budapeŝto!) Skribu al la Esperanto-Kongreskomitato, MNSZ, Mária str. 13, Pécs, Hungarujo. Kiu iros al Budapeŝto, nepre poste vizitu la Kongreson en Pécs! Aliĝu jam nun! Vojaĝ-rabatoj en- kaj eksterlandaj. (489)

Geesperantistoj, vojaĝontaj tra Turku (Åbo) en Finnlando, informu antaŭe s-ron F. Ojala, Kõydenpunajank. aŭ la samideanoj, cititajn en la adresaroj (jarlibroj), por ke ni povu renkonti kaj gvidi vin! (497)

Por studi terkulturon, unue en okcidenta, poste en orienta parto de Anglujo, mi kun kamarado komence de majo **trabiciklos Nederlando, Belgujo kaj Nordan Francujon** survoje al Anglujo, kaj ni ŝatus interrilatiĝi kun tieaj samideanoj. Skribu tuj al Aage Madsen, **Vallekilde, Danujo.**

Delegito de IEL deziras interŝanĝi poŝtkartojn, ilustritajn aŭ ne, **presitajn** en aŭ pri Esperanto. Respondo certe kaj samspece. C. Rousseau-Esperanto, 2, rue Alfred-de-Vigny, **Courbevoie (Seine), Francujo.**

Seriozuloj! Esperanta Klubo de Melbourne petas de vi leterojn pri la Esperanta vivado en via rondo. Skribu klare almenaŭ cent vortojn! Taŭgan respondon garantias Esperanta Klubo, Box X.2723, Elizabeth Street, G.P.O., **Melbourne, Aŭstralio.**

60 Cseh-kursanoj deziras korespondi kun ĉiulandaj esperantistoj. Skribu baldaŭ al: S-ro Zwanepoel, **Koekelaere;** F-ino Top, Nieuwstraat 12, **Veurne;** F-ino M. Vandermeeren, Dorpplaats 120, **Alveringem;** ĉiuj en Belgujo.

2 danaj junuloj intencas trabicikli Germanujon, Svisujon, nordan Italujon, Francujon, Nederlando. Volonte ni vizitos gesamideanojn survoje en la tempo majo-septembro. Skribu al buter- kaj fromaĝisto Chr. Andersen, **Aadelund, Brörup, Danlando.**

Interŝanĝo: Poŝtmarkojn kvanton kontraŭ kvanto. S-ro Sten Karlsson, Söderby, **Amgarn, Svedujo.** — Popularajn prelegojn en Esperanto. S-ro Severin, **Enskede, Svedujo.**

Du komencantoj deziras korespondi. Adreso: S-ro Olle Andersson, Humlegatan 5, **Högnäs, Svedujo.**

Pasigu vian someran ferion, inter multaj Esperantistoj, en Helsingör, Danlando!

En la pasinta somero 210 personoj el 14 landoj.

16. - 24. de julio 1938: Internaciaj Feriaj Esp.-Kursoj (daŭriga, perfektiga kaj seminaria) Nur 48,— d.kr. inkluzive plena pensio.

15.-25. de aŭgusto 1938: 10-taga Feriala Esperantista kun prelegoj de eminentaj Esperantistoj. Nur 55,— d. kr. inkluzive plena pensio.

Ĉiuj estos kore bonvenaj!

Prospekto senpage havebla ĉe s-ro L. Friis, Thyrasvej 15, **Aabyhöj, Danlando** (495)

10-taga Esperanto-restado en "Ry", Danlando

(31.7.—10.8.1938).

Plena pensio de 33-50 kronoj (= 14-20 guldenoj).

Lastjare 160 partoprenintoj el 10 landoj.

Senkosta prospekto ĉe:

H. Grónborg, Risskov, Danlando.

(473)

Ismael Gomes Braga



2-VI-1937

Revista de "GAZETO DE AMERIKO" Rio-de-Janeiro

124-paĝa, klare presita, plaĉe arangita. Tre simpatia eldonaĵo, libro valora por ĉiu esperantisto, fonto de entuziasmo kaj de firma konvinkigo, el kiu plezure ĉerpos ĉiu samideano — veterano kaj novulo.

Prezo: broŝurite:

5 milr., ĉe Livraria Editora de Federação E. Brasileira, Av. Passos 30, Rio de Janeiro, Brazilo;

0.80 ned. guld (inkl. sendkostoj) ĉe Heroldo de Esperanto, Scheveningen, Nederlando;

1 ŝ. 9 p. ĉe Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

(447)

Fasontranĉkurso

Sinjorinoj! Ĉu vi volas lerni interesmaniere: fasontranĉi kaj kudri ĵupojn, bluzojn, surtutojn ktp.? Demandu informojn pri nia speciala, letera.

Fasontranĉkurso en Esperanto!

Ankaŭ la sinjoroj povas profiti sian Esperanto-leratecon, se ili tradukos la kurson por siaj familianoj aŭ konatuloj. — Demandu informojn ankaŭ pri niaj fasonoj laŭ mezuro!

Informoj ĉstos forsendataj nur, se Internacia Poŝt-Respondukuponon estis sendita al:

Internacia Modprofesia Lernejo
Pelikaanstraat 38 bis, Utrecht (Ned.)

aŭ se Hfl. 0.12½ estis ĝirita al poŝtĉek-konto 151493 de G.J.C. Enderman Jr., Utrecht.

Presejo de Belga Esperanto-Instituto K. S. Antverpeno — Belgujo.

